

Bulgara Esperantisto

Decembro 1988



ENHAVO

- 4 Pri d-ro Zamenhof kiel poligloto (Nikola Aleksiev)
- 6 Oficialaj dokumentoj de la 73-a UK de Esperanto
- 9 Tolstoj — eminenta patrono de Esperanto (Ĥr. Iskov)
- 10 Scienc-teknika E-movado en Ĉinio (El „El Popola Ĉinio“)
- 13 Juna Esperantisto (Atanas Ilkov, Rumjana Taĉeva)
- 15 Por nia lingva perfektigo (Kunĉo Vălev)
- 16 Poetino de la vivĝojo — Dora Gabe
- 17 Originala verkaro (Joanna Konstantinova)
- 20 Ni recenzas (Evgeni Georgiev, Venelin Mitev)
- 23 300 jaroj de la Ribelo de Ĉiprovcj (Ljubka Nikolova)
- 24 Someraj internaciaj kursoj en Pisanica (Libertaria Mladenova)
- 25 Leteroj de korespondamiko (Marija P. Angelova)
- 27 Tra la mondo
- 28 Bulgario dum la XXIV Someraj Olimpikoj (Teodor Ĉe-rešov)
- 30 Enlanda movado
- 32 Deziras korespondi
- III Krukvortenigmo

REDAKTA KOMITATO

ĈEFREDAKTORO: Maria JANKOVA

Atanas ILKOV (redaktoro); Evgeni GEORGIEV (redaktoro); Dimitar HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VĂLEV, Libertaria MLADENOVA, Lidia RAEVA (respondeca sekretario), Mariana ELENOVA, Radoslav PARAŠKEVOV, Nikola NIKOLOV, doc. Stojĉo STOJĈEV, Venelin MITEV.

Pentristo: Penka PETKOVA

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Nikola NIKOLOV

ADRESO DE LA REDAKCIO: bul. „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio.

Eldonkvanto — 6500 ekz.

Materialojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe, koncizajn kaj konkretajn, nur en Esperanto, verkitajn en bona lingvo, tajpitajn aŭ klare skribitajn. Por publikigo sendu nur bonkvalitajn fotojn.

En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla nur per la poŝto kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv. por aliaj landoj 7.80 lv.

Atenton! Estas organizita regula registrado de la revuo sur magnetofonbendo por la bezonoj de blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo. „Blanka silento“

Foto: Kirilka SAVOVA

Karaj amikoj

Fine de 1988, en la nomo de la redakta skipo, mi deziras turni min al niaj fidelaj kunlaborantoj, kiuj dum la tuta jaro vivis kun niaj streboj, zorgoj kaj problemoj.

Foliumante la ĉi-jarajn kajerojn de „Bulgara Esperantisto“, mi denove konstatis la regulan kunlaboradon de niaj multjaraj legantoj nome: doc. Georgi Dimov el Varna, Cvjatko Todorov, Ĥristo Tonev kaj Ilija Andreev el Ŝumen, Asen Josifov, Marija P. Angelova kaj Lilia Koleva el Sofio, Jordan Kalinov el Ruse, Bojana Prodanova kaj Sonja Tiĥova el Gabrovo, Ljubomir Trifonĉovski el Vraca, Nikola Uzunov el Ĥaskovo, Penka Papazova el Jambol. Ĉi tie mi mencias ankaŭ niajn eksterlandajn amikojn: Bernard Golden el Hungario kaj A. Vaitilavičius el Litovio (USSR).

Mi sincere dankas la spertajn E-jurnalistojn Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, Violin Oljanov, Kunĉo Vălev, Krâstju Karucin kaj Canko Murgin pro ilia konstanta helpo.

Agrablan impreson dum la jaro faris la pli juna generacio — niaj kunlaborantinoj Liliĵa Nikolova el Razgrad kaj Iliana Ilieva el Jambol.

Malofte en la redakcion venas bonkvalitaj fotoj kaj pro tio mi emfazas la profesiajn kontribuojn tiu-direkte de Ĥristo Mitev el Gabrovo kaj Kiril Kalĉev el Loveĉ, kies fotoaparatoj fiksas interesajn momentojn el la landa E-movado.

Ni ankaŭ ne devas forgesi la aktivecon de la membroj de nia redakta komitato nome: Dimitar Haĝiev, Nikola Nikolov, Venelin Mitev, Radoslav Paraŝkevoj.

Dum 1988 pliboniĝis la rilatoj inter la redakcio kaj la revua legantaro, kaj inter la redakcio kaj la apartaj komisionoj ĉe CE da BEA. Dank' al ĉi-lastaj kontaktoj aperis variaj artikoloj verkitaj de la sekretarioj kaj membroj de tiuj komisionoj.

(Daŭrigo sur paĝo 3)



Jaro 57

N-ro 12

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

LA STATO DE NIA ASOCIO

Sava DÄLBOKOV,
Prezidanto de BEA

La 16-an de januaro 1988 okazis Plenkunsido de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio, en kiu oni akceptis novan koncepton pri la evoluo de BEA kaj aprobis ties novan organizan strukturon. Depost tiam pasis preskaŭ unu jaro. Kion ni atingis kaj kion ni ne sukcesis fari dum tiu periodo?

Ĉefaj taskoj de la renovigo estis likvidi la administrajn-burokratajn metodojn, plivastigi la libervolan principon de kunlaborado kaj redukti la nombron de salajrataj oficistoj. Plenumante ĉi-lastan taskon, oni reduktis la etaton de BEA por 1988 kompare kun 1987 per 50% kaj la materialajn elspezojn — per 40%. Anstataŭ la antaŭe ekzistantaj fakoj kaj servoj, ĉe CE de BEA ekfunkciis Komisionoj pri la bazaj labordirektoj, kiuj estis aprobitaj de la januara Plenkunsido de CE

de BEA. Al la komisionoj estis altiritaj membroj de CE de BEA, kompetentaj esperantistoj, kaj oni kalkulis je pli vasta partopreno en la pritrakto kaj efektivigo de la koncernaj taskoj. El la laboro de la komisionoj ĉe CE de BEA jam rezultis vico da pozitivaj manifestigoj kaj iniciatoj.

La Komisiono pri Instruagado akceptis vicon da dokumentoj kaj programoj pri la E-instruado, pri organizo de diversgradaj kursoj por preparo de Esperantaj kadroj. Estis lanĉita iniciato pri enoficigo fare de la Ministerio de Scienco, Kulturo kaj Klerigo de 20 metodikistoj pri Esperanto en la mezlernejoj en la lando. Al iuj societoj jam estas proponita metodika helpo. Estis preparitaj du kartotekoj de la E-instruantoj en Bulgario. Kreskis la nombro de personoj lernantaj Esperanton.

Okazigitaj kursoj:

	1986/87	1987/88
Lernojaro	167	217
Nombro de la kursoj	1196	3564
Partoprenis la kursojn	285	1266
Diplomiĝis	125	148
E-Instruantoj		

Kiel videblas de la ĉi-supra tabelo sukcesoj estas, tamen maltrankviligas la diferenco inter la nombro de diplomigintoj kaj tiu de komencintoj. Estas kursoj kun minimuma nombro de finintoj, kaj iuj kursoj eĉ fiaskis. Oni ne certigis la provizon de ĉiuj dezirantoj per la necesaj lernolibroj, vortaroj kaj libroj. La Komisiono devas batali por

havigo de instruhelpiloj, devas certigi lernolirojn por ĉiu partoprenanto en la koncernaj gradoj de E-instruado. Oni devas aktualigi la metodojn kaj rimedojn de instruado, la pervidajn instrumaterialojn, faciligi kaj plibonigi la lernadon de la lingvo, kaj aparte ties paroladon kaj uzadon. Necesas ankoraŭ pli sperta pedagogia laboro

fare de la E-instruantoj, ankaŭ la societoj devas aktive kontribui por ke maksimuma nombro de la kursanoj finu la kursojn kaj diplomiĝu. Al la demando pri plivastigo kaj plibonigo de la instruado kaj pri ekposedo de Esperanto pli grandan atenton devas turni kiel la Centra Estraro de BEA kaj la Komisiono pri Instruagado, tiel ankaŭ la estraroj de la lokaj societoj.

La Komisiono pri Idea-Eduka Agado periode pritraktas dum siaj kunsidoj vicon da demandoj el sia multfaceta laboro. Bone sin prezentas Bulgara E-Teatro, kantkolektivoj k. a. Pliĉonigita estas la kvalito de la bulgara E-gazetaro, utilaj estas la okazigataj Revuoj de la E-Parolo kaj Kanto.

Plifortiĝis la kontaktoj kun agantoj en la kultura sfero — fruktodonaj estis la renkontiĝoj kun Vanĉa Dojĉeva, prezidantino de la Asocio de Aktoroj, kun Valentin Karamanĉev, ĝenerala direktoro de la Krea-Mastruma Unuiĝo „Bulgara Libro kaj Gazetaro“. Malgraŭ la interkonsento kun la estraro de la Komitato de Televido kaj Radio — la Komisiono ne iniciatis regulajn E-manifestiĝojn antaŭ la amas-komunikiloj, ne garantias amasan ĉeestantaron ĉe celebroy kaj aliaj aranĝoj. Pro la fakto, ke Bulgara E-Teatro, Sofia E-Horo kaj aliaj artokolektivoj troviĝas en Sofio kaj en iuj grandaj urboj, malofte ili gastludas en aliaj urboj.

Ni esperas, ke la E-Kulturdomoj estiĝos solida bazo de nia kultura agado. Ili estas organizataj en la grandaj urboj, ĉe la koncernaj E-societoj, apogas sin sur ili kaj kunlaboras kun ili por plivastigo de sia agado.

Kiel konate, la Komisiono pri Organiza Agado havas respondecajn taskojn lige kun la stabiligo de la E-societoj kaj sekcioj, la laboro kun la kadroj, unuecigo kaj kunagado de la apartaj laborgrupoj en la sistemo de BEA. La Komisiono traktis iujn gravajn demandojn, ligitajn kun la rekonstruo de la E-societoj, kun la strukturo kaj funkcioj de la sekcioj ĉe BEA, akceptis regularon pri la laboro de la Komisiono, la sekcioj kaj E-societoj. Estos preparite nova adresaro

kaj kartoteko kun informoj pri la estraroj de la societoj.

Post la administra reformo (likvido de la eksaj distriktoj kaj estigo de departementoj) grave ŝanĝiĝis la strukturo de BEA. Ties Centra Estraro ne plu povas sin apogi sur la distriktaj estraroj, kaj en la novaj departementoj kaj komunumoj ne ekzistas estraroj de BEA. Estis decidite, ke baza organiza unuo estu la E-societo. E-societoj estos organizataj en la urboj kaj en pli grandaj vilaĝoj. La Buroo kaj la Sekretariato de CE de BEA donis konkretan helpon — aparte en tiuj lokoj, kie estis rompita la unueco — pri organizo de kunvenoj, pri unuigo de la societoj en la grandaj urboj kaj elekto de novaj Estraroj. Oni speciale prizorgis la elekton de la kadroj: vico da gvidantoj de la eksaj distriktaj estraroj fariĝis prezidantoj de la novaj societoj. Rezulte de la renovigo la E-societoj malpliĝis de 230 al 180. Tiu ĉi grava tasko estis pli-malpli sukcese plenumita. Sed en iuj urboj, speciale tie, kie devis unuiĝi kelkaj societoj, manifestiĝis la ambicioj de unuopaj personoj kaj grupoj, montriĝis manko de unueco. Multaj el la societoj estas ankoraŭ ne stabiligintaj, malmultnombraj kaj ne havas tutjaran aktivan agadon. Mankoj estis allasitaj ankaŭ ĉe la reorganizo en Sofio, do estas necese atente prizorgi ankaŭ la stabiligon de la ĉefurba E-organizaĵo. Oni devas priatenti ĉefe la varbadon kaj avancigon de junaj homoj, grave pliĉonigi la laboron de la junulara sekcio, la laboron inter lernantoj, studentoj k. a. Okazis utila renkontiĝo kun la gvidantoj de la sekcioj de BEA, kie oni interŝanĝis pozitivan sperton pri la sekcia laboro kaj estis starigitaj taskoj pri ties plua aktiviĝo. Kvankam la salajrataj oficistoj de BEA vizitis multajn societojn, la fakto, ke la Komisiono pri Organiza Agado okazigis nur du kunsidojn atestas, ke oni ne traktis kolektive vicon da demandoj kaj la rezultojn de la laboro, ne engaĝas kiel libervolajn kunlaborantojn pli vastan reton da spertaj esperantistoj.

Estis organizitaj utilaj renkontiĝoj kun gvidantoj de la sekcioj, oni inter-

ŝanĝis pozitivan sperton kaj starigis taskojn celantajn ilian pluan aktivigon.

Ĉefa objekto de la laboro de la Komisiono pri Internacia Agado estis la preparo por partopreno de BEA en la 73-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo (Nederlando) kaj en la 44-a Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo (Jugoslavio), samkiel en vico da aliaj internaciaj Esperantaj renkontiĝoj, simpozioj k. a. Oficvojaĝoj al eksterlando kaj deleĝo de konvenaj personoj estos traktataj pli precize kaj estas kreita pli bona ordo sur tiu kampo.

Bulgara MEM-sekcio kaj la Turista Sekcio okazigis naciajn renkontiĝojn kaj disvolvas aktivan agadon. Devas ankoraŭ plibonigi la kunordigo kun la aliaj Komisionoj kaj kun la Internacia Esperanto-Kursejo lige kun la sendo de grupoj al eksterlando. Devas esti plivastigita la senvaluta interŝanĝo de grupoj, aparte de infanoj kaj de lernantoj-esperantistoj. Oni devas prizorgi ankoraŭ pli bonan organizon de la internaciaj laborbrigadoj. La ĝisnuna sperto montras, ke ni devas plibonigi la kunordigon inter la apartaj komisionoj. Tiudirekte devas kreski ankoraŭ la rolo de la Sekretariato, en kiu partoprenas respondecaj personoj el la apartaj komisionoj.

Multaj samideanoj prave starigas la demandojn: kial oni ne komisiis taskojn al la membroj de la Centra Estraro de BEA, kial oni ne informas ilin ĝustatempe pri la pli gravaj decidoj de la Buroo, kial oni ne serĉas ilian kunlaboron. Mi opinias, ke tiu kritiko estas justa. Kvankam iuj membroj de CE de BEA estas engaĝitaj en apartaj komisionoj, nur antaŭnelonge ni pri-

pensis la demandon, kiu esperantisto en kiu agadkampe povus esti utila.

Malgraŭ ke en la raporto antaŭ la Plenkunsido de la 16-a de januaro k. j. oni klare starigis la demandon, ke la E-societoj, sekcioj kaj kulturdomoj serĉu kunlaboron kaj helpo de la publikaj organizaĵoj, esenca ŝanĝo tiurilate preskaŭ ne estas. Vizitante vicon de grandaj urboj, oni ekhavas la impreson, ke la lokaj filioj de la sociaj organizaĵoj eĉ ne konas la prezidantojn de la E-societoj kaj kluboj.

Nia granda zorgo estis meti ordon en la financa agado de la Asocio. Oni akceptis la buĝeton de CE de BEA por 1988 kaj de la apartaj societoj, koncentrigante la monrimedojn, ricevatajn de Ĉefa Ekonomia Direkcio „Globus“ kaj distribuante celkonforme ilian elspezadon. Nun la estraroj de la Esperantaj societoj kaj kulturdomoj kune kun Fako „Financa-Ekonomia“ ĉe CE de BEA devas serioze prizorgi la bonan preparon de la buĝeto de BEA por 1989.

Ĉiuj ĉi koncize prezentitaj rezultoj de la renovigo estis traktitaj de la Buroo de CE de BEA dum ĝia kunsido okazinta la 28-an de septembro 1988. Ĝenerala pritakso de tiu kardinala demando estos farita dum la antaŭstaranta plivastigita Plenkunsido de CE de BEA.

Nun, fine de unu streĉoplena kaj renoviga jaro, mi volas saluti la bulgariajn esperantistojn pro la farita de ili malfacila laboro kaj okaze de la Nova Jaro 1989 bondeziri al ili sanon kaj fortojn por daŭrigi la komencitan laboron — la stabiligon de BEA kiel aŭtoritata kultur-kleriga organizaĵo en nia lando kaj eksterlande.

Karaj
amikoj



De n-ro 1/1989 la redakcio anoncas inter siaj kunlaborantoj verkemuloj kaj fotistoj konkurson de verkoj aperintaj dum la jaro en nia revuo omaĝe ĝia 70-jara jubileo. La nomoj de la plej aktivaj kaj talentaj aŭtoroj kaj fotistoj kaj la titoloj de la premiitaj verkoj estos publikigitaj post unu jaro — en n-ro 1/1990. Ĝis tiam — aĝrablaĵoj kaj fruktodona laboron! Ni ege ĝojus eventua-

lan plimultiĝon de la nombro de niaj amikoj kaj helpantoj-kunlaborantoj. Antaŭ ol diri „Ĝis“, mi dezirus nur informi vin, ke al la redakcio konstante venas pluraj leteroj de niaj legantoj, en kiuj oni pritaksas la novan „veston“ de „Bulgara Esperantisto“ kaj la revuan enhavon. Tiujn demandojn ni preparolos sekvontnure. Ĝis tiam — „Ĝis“.

Maria JANKOVA

Pri D-ro Zamenhof kiel poligloto

En la redakcio de „BE” estas ricevita leterdemonstrando de Ivan Šopov el Varna — strato „P. Volov” 8, rilate la aserton en mia libro „*Esperanto centjara*”, ke Zamenhof estis rimarkinda poligloto, kiu konis pli ol dek lingvojn. La aŭtoro de la letero demandas: nome kiujn lingvojn konis Zamenhof?

Eltiraĵo el la letero de Zamenhof (21-a de februaro 1905) al la konata franca esperantista pioniro Michaux — prezidanto de la Bulonja E-grupo, li mem skribas la jenon: „.... Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t. e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (margene: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzercigadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ — ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie...” (El *Enciklopedio de Esperanto*, paĝo 580, Dua eldono — 1979, Budapeŝto).

Oni povus tiri malĝustan konkludon el la tre sinceraj vortoj de la ege modesta homo kia estis Zamenhof dum sia tuta vivo. Oni povus dubi pri lia poligloteco, opiniante ke kiu ajn persono, pretendanta esti poligloto, devus nepre koni sufiĉe grandan nombron da lingvoj — ne nur **legi** en ili, sed ankaŭ **paroli**, praktike uzi ilin ĉu konstante, ĉu **epizode**. Tiu imago pri poligloteco estas malĝusta. La poligloto kutime **legas** kaj **parolas bone** nur kelkajn lingvojn. La ceterajn (ili povus esti eĉ 20—30—40) li uzas en pli limigitaj kadroj: ekz. **legi** (pli malpli bone prononci), sed ne paroli (aŭ nur balbuti, eventuale uzi buŝe nur salutvortojn, proverbojn k. s.). Tio tamen ne malhelpas al similaj personoj bone, eĉ bonege orientiĝi en la strukturo de la koncernaj lingvoj, en ties specifaĵoj rilate gramatikajn, stilajn,

leksikajn kaj aliajn problemojn, havante pri ili precipe teoriajn konojn. Estas konata al ĉiuj esperantistoj tra la mondo la ekskluzive inteligenta E-gvidanto prof. d-ro Ivo Lappena. Li ne estis persono modesta kiel d-ro Zamenhof. Li havis ĝustan imagon pri siaj kapabloj kaj ne suferis pri malalta memsento, eĉ ofte publike demonstris sian eruditecon („tri profesorecojn, du doktorecojn, longjara ĝenerala sekretario de UEA, kaj poste sufiĉe longtempe ĝia prezidanto” k. s.). Li persone rakontis al mi, ke li posedas diversgrade 14 lingvojn. Tio sufiĉe bone montras, ke li ankaŭ estis poligloto. Sed li aldonis: „Mi tamen povas legi kaj kompreni tekstojn en pluraj el tiuj lingvoj, inkluzive la bulgaran, sed mi ne povas korekte paroli ĉiujn”. Kaj malgraŭ la granda parenceco inter lia nasklingvo (kroata-serba) kun la bulgara (ĉiuj du el malnovslava deveno) Lappena neniam eĉ unu frazon ne diris al mi en la bulgara dum niaj longaj horojn daŭrantaj konversacioj. Sed ĉu iu rajtas el tio konkludi, ke li ne estis fakta poligloto?

Mi konas ankaŭ alian tre kontrastan observon pri poligloteco: en la malliberejo de Sofio (Nikola Aleksiev estis politika malliberulo antaŭ la socialisma revolucio en Bulgario — la Naŭa de Septembro 1944 — Noto de la Redakcio) mi estis punita resti en subtera malhela kelo kun humida planko dum tuta monato kune kun fama tiutempe profesia krimulo Pantudi. Tiu krimulo povis **praktike** (parole) uzi dek unu lingvojn, sed li estis analfabeta, inkluzive la bulgaran. Li petis aliajn malliberulojn skribi liajn leterojn kaj legi al li la respondojn... Jen ankaŭ alia stranga, tamen fakta poligloto...

Sed en la kazo de d-ro Zamenhof (kaj Lappena) la afero statas alimaniere. Ili ambaŭ (precipe Zamenhof) estis **naturdotitaj talentaj pri lingva kvalifikeco** personoj. Nome tio permesis al d-ro Zamenhof eĉ en lia juneco okupiĝi pri **lingvo-kreado**. Tiurilate lia poligloteco kombinita kun lia lingva talento helpis al li orientiĝi en la **teorio de la lingvoj**, kiujn li bone aŭ ne profunde konis. Tiurilate li superis eĉ profesiajn lingvistoj (kaj poliglotojn), kiuj ne

kapablis tiom profunde enpenetri la **esen-**
can enhavon de kiu ajn homa lingvo el
teoria vidpunkto. Ĉu estis hazarda lia sol-
vo pri internacia helplingvo nome per uza-
do de jam ekzistantaj en la ĉefaj hindo-eŭ-
ropaj lingvoj internacie uzataj vortoj
(teatro, poŝto, studento, oficio, religio
k. s.)? Tio koncernas la leksikon. Sed ĉu
ankaŭ hazarda estas lia tre ekonomie
konstruita **gramatika** modelo de Esperan-
to? Kaj ĉu ne logikaj estas liaj argumentoj
pri esperanta stilo? Oni povus aserti, ke an-
kaŭ en la angla la gramatiko estas sufiĉe
simpla. Sed ĉu oni povus diri la samon pri
la angla **stilo**, eĉ ne tuŝante la temon pri
la angla prononcado?

Kaj sekve: kiam ni faras buŝan aŭ skriban
publikan informadon, eĉ propagandon pri
la personeco de la aŭtoro de Esperanto, laŭ
mi ni devas aludi pri liaj teoriaj lingvoko-
noj, pri lia talento de lingvisto-inventisto,
lingvo-kreanto, lingvo-konstruanto.

Estas konate, ke ankaŭ aliaj sendube ta-
lentaj personoj, inter kiuj monde konataj
profesiaj lingvistoj, farintaj provojn krei al-
tipajn internaciajn lingvojn, aŭ eĉ strebante
utiligi Esperanton por produkti pli perfek-
tan ol ĝi internacian lingvon, ne sukcesis
tiagrade kiel Zamenhof. Kaj la fakto, ke
UNESKO rekonis nome Esperanton kaj ties
aŭtoron-iniciatoron Zamenhof same
substrekas tiun aserton.

Nikola ALEKSIEV

En la Buroo de CE de BEA

En sia kunsido okazinta la 4-an de oktobro 1988 la Buroo de CE de BEA decidis fondi Unuigitan Redakcion ĉe CE de BEA.

La Unuigita Redakcio prizorgos la redaktadon de revuo „Bulgara Esperantisto“, de bulteno „Panorama „Esperanto“ (kiu ĝis la fino de 1988 aperis sub titolo „Informacia „Esperanto“) kaj de la E-libroj eldonataj de BEA. La konsisto de la novefondita Unuigita Redakcio estas jena: Maria Jankova (ĉefredaktoro), Lidia Raeva (respondeca sekretario), Atanas Ilkov, Evgeni Georgiev kaj Mariana Evlogieva (redaktoroj).

Ĉe la Unuigita redakcio ĉe CE de BEA funkcias la Librovendejo de BEA kun vendistino Margarita Atanasova. Administranto de la redakcio estas Rumjana Georgieva.

GRAVA DISTINGO

Bona novaĵo venis en la redakcion de BEA: la 27-a jarkunveno de UMEA, okazinta la 25-an de julio 1988 en Roterdamo, enkadre de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, distignis nian ĝisnunan redakcianon prof. d-ron Kiril Popov

per la UMEA-premio pro lia multjara sindona E-laboro en la kampo de medicino.

Prof. d-ro Kiril Popov esperantistiĝis en 1937 en Veliko Tŕrnovo. Li estis membro de E-societo „Flamo“.

Nun li estas prezidanto de la Medicina E-Sekcio ĉe BEA kaj vicprezidanto de la Internacia Medicina E-Asocio (UMEA).

Ĉi-sube legu la plenan tekston de la distinga diplomo.

DIPLOMO

Prof. d-ro Kiril Popov

Uzante la okazon de la 27-a Jarkunveno de Universala Medicina Esperanto-Asocio, aranĝita la 25-an de julio 1988 en Roterdamo, kaj laŭ la decido de la Komitato por la UMEA-Premio, UMEA donacas al Vi UMEA-premion kaj esprimas la plej altan respekton kaj la plej sinceran dankon pro Via multjara sindona Esperanto-agado en la kampo de medicino. Ni samtempe deziras, ke Vi daŭrigu la laboron por progresigo de apliko de Esperanto en medicino.

La Komitato por UMEA-Premio:
Gen. Sekretario:
Saburo Yamazoe

Prezidanto:
Imre Ferenczy

La 25-an de julio 1988

Al:

Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA

Karaj Gekolegoj,

Komence de nova deĵoraro de la Asocio, mi kaptas la okazon deziri al vi bonan sukceson en via laboro por Esperanto. Kiel veŝajne jam raportis al vi via(j) komitatano(j), la kunsidoj dum la Universala Kongreso en Roterdamo montriĝis aparte fruktodonaj. Unu el la ĉefaj atingoj estis „generala” akcepto de nova Strategia Plano de UEA. Per sia decido „ĝenerale” akcepti la Planon, la Komitato indikis sian konsenton pri ĝia baza enhavo, sed ankaŭ sian deziron (tute prave), ke dum la jaro 1988—89 okazu iom ampleksa debato pri la enhavo de la Plano, kaj surbaze de tiu debato oni faru necesajn modifojn. Prave oni atentigis, ke plej bone efikas tiuj planoj, en kies formulado ĉiuj koncernatoj partoprenis. Dum la jaro ni certe estos en kontakto kun vi pri la Strategia Plano, kaj ni esperas, ke vi ĝisfunde debatos kaj diskutos ĝin en viaj diversaj organoj.

La ĉefa celo de mia hodiaŭa letero tamen ne estas la Strategia Plano. Dum la Kongreso ni publike anoncis, ke la Honora Patrona Komitato de UEA (organo kutime iom silenta) faris specialan Deklaracion okaze de la Jubileo. La Deklaracio, kiu portas do la subtenon de pluraj socie gravaj personecoj, prezentas bonan bazon por



eventuala interveno ĉe viaj enlandaj instancoj, ĉe viaj universitataj kontaktoj, ĉe viaj parlamentanoj, ĉe la gazetaro, ktp. Vi povus konsideri la eblecon pretigi nacilingvan version de la Deklaracio kaj ĝin uzi enlande, aŭ gazetaran komunikon kun bazaj informoj pri la Deklaracio. Ni sendas al vi ĉi-kune la Esperantan tekston. Anglalingva traduko estas havebla ĉe mia adreso, se vi povus tion uzi.

*Sincere salutas,
Humphrey Tonkin
prezidanto, UEA*

Deklaracio de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio

Je la okazo de la 100-jara Jubileo de la Internacia Lingvo-Esperanto,

notinte la inviton de Unesko al siaj membroj, partopreni en la festado de tiu Jubileo, **rimarkinte** ankaŭ la grandan atenton, kiun Esperanto nuntempe ricevas, en la gazeta-ro kaj inter la intelektularo kaj ĝenerala publiko tra la tuta mondo, ni, sciencistoj, lingvistoj, politikistoj, diplomatoj kaj verkistoj,

okupinte aŭ okupante respondecajn postenojn en la publika vivo de niaj respektivaj landoj,

spertinte la neceson de komuna lingvo en internaciaj rilatoj por interkompreniĝo, paco kaj evoluo,

lerninte Esperanton, kaj provinte ĝiajn kapablojn dum multaj jaroj,

deklaras, ke Esperanto estas ne nur — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — lingvo taŭga por ĝenerala lernado kiel dua lingvo por ĉiuj, sed ke ĝi jam fariĝis lingvo, per kiu ni povas esprimi precize niajn pensojn en niaj propraj fakoj, kaj samtempe la riĉan kaj nuancitan pensadon de la literaturo, kaj

tial ni rekomendas al registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj en ĉiuj landoj, same kiel al la sekretariatoj de interregistaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj profesiuloj, ke ili mem lernu la Internacian Lingvon kaj ebligu ĝian enkondukon en la lernejojn de la mondo.

La Honora Patrona Komitato de UEA konsistas el la jenaj personoj:

1) **Ralph L. Harry** (Aŭstralio), estinta ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjoko (prezidanto de la Honora Patrona Komitato);

2) **Paul Ariste** (Sovetunio), profesoro de la finn-ugra lingvoscienco en Nacia Universitato de Tartu, membro de la Estona Akademio de Sciencoj kaj honora membro de la Finna kaj Hungara Sciencaj Akademioj;

3) **Bakin** (Ĉinio), verkisto, membro de la Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso, vicprezidanto de Ĉina Federacio de Literatura kaj Arta Rondo, aganta prezidanto de Ĉina Verkista Asocio;

4) **Chang Choong-sik** (Korea Respubliko), diplomito pri historio ĉe Seul-Nacia Universitato, prezidanto de la Universitato Dankook, prezidanto de la Korea Eduka Konferenco;

5) **Chen Yuan** (Ĉinio), direktoro de la Instituto pri Aplika Lingvistiko ĉe Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro en la Ŝtata Komisiono pri Lingvo, verkisto kaj eldonisto;

6) **Ingemund Bengtsson** (Svedio), prezidanto de la sveda parlamento, vicprezidanto de konsilio de la Socialdemokrata Partio, estinta ministro pri agrikulturo kaj labormerkato;

7) **Willem Drees** (Nederlando), estinta ministro pri sociaj aferoj kaj eksĉefministro de Nederlando;

8) **H. Lionel Elvin** (Britio), estinta direktoro de la Departemento pri Edukado de Unesko, emerita profesoro kaj direktoro de la Instituto pri Edukado de Londona Universitato;

9) **Harry Harrison** (Usono), aŭtoro de sciencfikciaj verkoj, eksprezidanto de *World SF*, internacia organizaĵo de sciencfikciaj verkistoj kaj redaktoroj;

10) **Vasil Peevski** (Bulgario), honora Prezidando de la Internacia Federacio de

Geodeziistoj, prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Geodeziistoj;

11) **Miguel Sancho Izquierdo** (Hispanio), honora rektoro de la Universitato de Zaragoza, membro de la Supera Konsilio de Sciencaj Esploroj;

12) **Tadao Umesao** (Japanio), ĝenerala direktoro de la Nacia Etnologia Muzeo, komisiito de la japana registaro pri kulturaj rilatoj eksterlande.

KONGRESA REZOLUCIO

PARTOPRENI EN RESPONDECA DISVOLVADO DE LA SCIENCO

La 73-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinte de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1988 en Roterdamo,


diskutinte diversajn aspektojn de la rolo de la scienco kaj tekniko en la formado de la estonteco de la homaro, kaj

konstatinte — kiel aliaj racie pensantaj homoj ĉie en la mondo — ke la plua disvolvado kaj paca aplikado de la scienco kaj tekniko estas nemalhavebla bazo por la evito de la detruigo de la biosfero, por la saĝa mastrumado de la naturaj provizoj, por la sekurigo de sanaj biologiaj vivkondiĉoj kaj por la plua socia kaj kultura evoluo de la homaro; krome, ke la sociaj kaj naturaj sciencoj kaj scienca tekniko estas laŭesence internaciaj kaj plej altgrade bezonas senperajn, vastajn kaj facilajn kontaktojn, informo-interŝanĝojn, vivajn diskutojn kaj homan interkompreniĝon tiel inter siaj kultivantoj kiel inter tiuj kaj la nesciencistaj amasoj,

konkludis, ke la esperantistaro devas tutanime apogi la pluan disvolvadon kaj disvastigon de la scienco kaj tekniko kaj — kune kun la neesperantistaj amasoj — aktive partopreni ĉiunivele en la diskutoj pri, kaj agoj por, la konscienca, respondeca kaj plej celhava aplikado de ties rezultoj;

refirmigis, ke la Rezolucio pri Faka Aplikado akceptita okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986 — kiu pleje emfazis la neceson pri la intensa utiligo de Esperanto en la sciencoj kaj tekniko kaj pri la aktiva kunlaboro ankaŭ en kaj kun la neesperantista scienca medio — estas ĝusta, kaj ke ties plenumon UEA kaj ties membroj devas pli intense daŭrigi kaj sukcesigi.

Lev Nikolaeviĉ Tolstoj — eminenta patrono de Esperanto



Dum la kuranta jaro pleniĝas 160 jaroj depost la naskiĝo de la granda rusa verkisto L. N. Tolstoj, aŭtoro de la romanoj „Milito kaj paco“, „Anna Karenina“, „Renaskiĝo“ k. a. En ligo kun tiu ĉi datreveno en Moskvo malfermis pordojn muzeo-ekspozicio, kie estas konservataj ekzempleroj de la unuaj eldonoj de Tolstoj, centoj da fotografaĵoj, artaj portretoj kaj skulptaĵoj de la verkisto, plenumitaj de famaj pentristoj kaj skulptistoj. Celebradoj de Tolstoj kaj legadoj de liaj verkoj okazas tra la tuta lando.

Tolstoj estis unu el la unuaj eminentaj patronoj de Esperanto. Jam la 16-an de septembro 1889, respondante al V. Majnov, li skribis: „Mi opiniās la ellernon de komuna eŭropa lingvo (t. e. la internacia lingvo Esperanto) afero urĝe necesa... Mi laŭpove penos disvastigi tiun lingvon kaj, kio estas la ĉefa, konvinki ĉiujn, pri ĝia neceso“. La 27-an de aprilo 1894 Tolstoj skribis la famajn frazojn: „Mi multfoje vidis, ke homoj malamike interrilatis nur sekve de la mekanika baro kontraŭ la reciproka komprenado. Tiamaniere la ellerno de Esperanto kaj ĝia propagando estas sendube agado, kiu prezentas la ĉefan kaj solan mision de la homa vivo“. Tiu ĉi favora rilato de Tolstoj al Esperanto ludis gravan rolon por la lingvo internacia. La vortoj de Tolstoj estis vaste uzataj por propagando de Esperanto. La 17-an de aŭgusto 1909 Tolstoj denove esprimis sian favoran rilaton al Esperanto, sendinte al J. Eydelnath (Francio) la ĝis tiam ne eldonitan „Raporton pri paco“, por ke ĝi aperu unue en Esperanto. Ĝi aperis en „Internacia socia revuo“.

Nelonge antaŭ sia morto, la 24-an de februaro 1910, Tolstoj denove eldiris sian fidelan simpatian por Esperanto. Sub influo de la verkisto la eldonejo „Posrednik“ eldonis multajn lernolibrojn de Esperanto por rusoj kaj specialan serion de literaturaj verkoj sub titolo „Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj“ 1912—1916. El la verkoj de Tolstoj aperis en Esperanto multaj malgrandaj rakontoj, el kiuj la pli ampleksaj estas: „Sieĝo de Sebastopolo“, „Kaŭkaza militkaptito“, „Du maljunuloj“, „La morto de Ivan Iliĉ“ k. a. Estas tradukitaj, sed ne eldonitaj „Milito kaj paco“, parte „Anna Karenina“, „Renaskiĝo“ k. a.

SCIENC-TEKNIKA E-MOVADO EN ĈINIO

En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la ĉina E-movado. La leviĝo de la ĉina scienc-teknika E-movado estas elstara pruvo.

En la Dua Esperanta Laborkunveno okazinta en aŭgusto 1979 nombro da sciencistoj kaj teknikistoj diskutis pri disvolvo de scienc-teknika E-movado. En novembro 1984 okazis en Uhan la Unua Scienc-teknika Esperanta Simpozio de Ĉinio kun partopreno de 127 reprezentantoj el 25 provincoj. En la simpozio oni interŝanĝis 62 disertaciojn pri medicino, elektroniko, biologio, kemio, geologio k. a. kaj diskutis pri fondo de prepara grupo de tutlanda scienc-teknika Esperanta organizo.

Ekde tiam sinsekve fondiĝis 16 scienc-teknikaj Esperantaj organizoj en Ĉinio. Inter ili la ĉefa estas la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA), sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS), kiu fondis la filiojn geologian, medicinan, ekonomian kaj komercan, junularan kaj starigis rilatojn kun alilandaj Esperantaj sciencistoj kaj teknikistoj.

La ĉinaj esperantistoj dekomence altaksis aplikon de Esperanto en scienc-teknika kampo. En 1909, kiam Esperanto enkondukiĝis ĵus en Ĉinion, la Ĥina-Esperanta Scienca Litaratura Revuo redaktita de Hua Nanguj proponis apliki Esperanton por konigi sciencojn. La revuo aperigis sinsekve popularajn sciojn pri medicino, karbo, fervojo, paperfarado kaj farado de aerŝipoj. Post sia fondiĝo la revuo „El Popola Ĉinio” aperigis pli ol 400 artikolojn pri sciencoj kaj teknikoj, ili vaste raportis pri scienc-esploraj atingoj kaj informoj de industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj aliaj flankoj de Ĉinio.

Estas menciinde, ke en la lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis plurajn sciencajn kaj teknikajn librojn, kiaj „Elektitaj Scienc-tenikaj Verkoj en Esperanto”, „Aŭtobiografio de Bakterio”, „Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva”, „Brilas Saĝo”, „Ĉinaj Protektataj Bestoj” kaj „Atlaso de Insekta Morfologio”. Ĝi eldonas sciencteknikajn librojn kaj terminarojn. Eldono kaj distribuo de tiuj libroj sendube

estas aktiva kontribuo kaj akcelo por popularigi sciencajn sciojn kaj apliki Esperanton en scienc-teknika kampo. Ni prenu „Brilas Saĝo” kiel ekzemplon. La libro kolektis 66 eseojn pri bazaj sciencoj, kiaj matematiko, fiziko, kemio, astronomio, geologio kaj biologio, kaj ankaŭ pri modernaj teknikoj disvolviĝintaj surbaze de tiuj sciencoj, ekz. pri lasero, ultrasono, telesenso, komputilo, kosmonavigado, genetika inĝenierado, atomenergio kaj transistoro. Ili temas pri vastaj kampoj kaj uzas multajn terminojn.

En la lastaj jaroj „La Mondo”, la organo de Ĉina Espranto-Ligo, publikigis iujn artikolojn, eseojn kaj mallongajn informojn pri sciencoj kaj teknikoj por kuraĝigi sciencistojn kaj teknikistojn publikigi sian disertacion en Esperanto. En la bulteno „Entomoxonomia” (Entomologia taksonomio) redaktita de prof. lo Chou, parto da artikoloj portas Esperantan koncizan resumon. Prof. lo Chou eldonis ankaŭ Eseperantan „Ĉinio Marŝas en Insekta Mondo”. Krome, iuj medicinaj E-asocioj eldonas neregulajn organojn, kiaj „Medicina Farmacia Floro”, „La Angulo de Medicina Ĝardeno” kaj „Informilo Medicina”, kiuj aperigis nemalmultajn artikolojn pri medicino.

Kompreneble, la plej influa estas la trimonata revuo „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj” eldonata de STEA sub ĈAS. Ĝi jam aperigis 13 numerojn kun pli ol 200 artikoloj, kiuj temas pri scienc-tenikaj fruktoj kaj informoj de diversaj fakoj. La revuo distribuiĝas al pli ol 40 landoj kaj regionoj kaj estas bonvena al diverslandaj esperantistoj.

La Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko antaŭlonge jam difinis Esperanton kiel la duan fremdlingvon en ekzamenado por promocioj funkciulojn kaj diplomi esplorajn studentojn, kaj kulturis nombron da Esperantaj instruistoj por 53 politeknikoj, agronomiaj institutoj, medicinaj institutoj, normalaj institutoj kaj universitatoj. Reveninte al sia instituto, iuj el ili funkciigas E-kurson, aliaj postlernohoran E-kurson. Milo da studentoj de politeknikoj lernas Esperanton. Nemalmultaj el ili eble fariĝos

elito de la ĉina scienc-teknika E-movado.

En la socio pli kaj pli multaj sciencistoj kaj teknikistoj interesiĝas pri Esperanto. Ili lernas Esperanton pere de televidilo, disaŭdigo aŭ koresponda lernejo. En Ĉinio centoj da funkciuloj estas promociitaj trapasinte la duan fremdlingvan ekzamenon de Esperanto. Multaj sciencistoj kaj teknikistoj verkas disertaciojn en Esperanto aŭ esperantigis disertaciojn por la „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj“, „Scienca Revuo“, „Geologio Internacia“ kaj „Medicina Internacia Revuo“. Tio montras, ke la ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj volontas konigi ĉinajn sciencajn atingojn al diverslandaj fakuloj pere de Esperanto, samtempe, ili sincere deziras interŝanĝi sciencesplorajn informojn kun ili. Por tio, ili starigis rilatojn kun multaj sciencistoj, faris fruktodonan kunlaboron. La esperanta-latina-ĉina „Atlaso de Insekta Morfologio“ estas bona kunlabora ekzemplo de esperantistoj ĉina, hungara, norvega kaj finnlanda. D-ro C. Stop-Bowitz, akademiano de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de la In-

ternacia Scienca Asocio Esperantista verkis antaŭparolon por la libro. La ĉina-esperanta „Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva“ estas kuna produktaĵo de ĉinaj kaj germanaj sciencistoj. La aŭtoro Helmar G. Frank verkis antaŭparolon por la esperanta-ĉina eldono, montrante: „Informinterŝanĝo inter la fakuloj eŭropaj kaj ĉinaj pri kibernetika pedagogio estos instiga al la plua klerigkibernetika esploro kaj evoluigo kaj tiel akirigos al la (ankoraŭ ne sufiĉe granda) kibernetika skolo de la klerigscienco pli da atento de la pedagogaro kaj en Ĉinio, kaj en Eŭropo.“

Multaj malproksimvidaj ĉinaj sciencistoj definitive subtenas Esperanton, precipe tiuj, kiuj lernis Esperanton en juneco, ankoraŭ havas fervoran senton al ĝi, malgraŭ ke iuj sciencistoj ne konas Esperanton kaj eĉ havas al ĝi partiecon.

Lu Ĝjaŝji, eksprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, plurfoje kuraĝigis sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esperanton kaj apliki ĝin por disvolvi internacian sciencon kaj teknikan interŝanĝon. Post la



Membroj de E-kurso organizita de Sciencista-Teknika Esperanto-Asocio sub Ĉina Akademio de Sciencoj.

fondigo de STEA sub ĈAS li ĝoje konsentis esti ĝia honora prezidanto.

Fama ĉina neorganika kemiisto Jan Dongŝeng estas prezidanto de STEA sub ĈAS. Li tre zorgas pri disvastigo kaj apliko de Esperanto en la scienc-teknika kampo. Li ĉeestis la inaŭguron kaj ferman kunsidon de la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazigita en 1986 en Pekino. En la kunveno li faris entuziasman paroladon, kaj gratulis la Konferencon pro ĝia plena sukceso.

Aliaj 24 famaj ĉinaj geologoj, arkeologoj, meteorologoj, fizikistoj, mekanikistoj, akustikistoj kaj matematikistoj invitive funkcias kiel konsilantoj de STEA sub ĈAS.

Nombro da famaj natursciencistoj kaj socisciencistoj aliĝis al la societo Amikoj de Esperanto. Ekz., famaj fizikisto Ĝou Pej-

jūn, mekanikisto Tna Haŭŝeng, entomologo lo Chou, juristo Ĝang Joŭtan, historiisto Ĝou Guĉeng, ekonomikisto U Dakun k. a. Ili ĉiuj kuraĝigas sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esperanton kaj proponas aplikon de Esperanto al sciencoj kaj teknikoj. Dum dekoj da jaroj prof. lo Chou seninterrompe sin dediĉas al tio. Li diris: „La Suno lumigas ne sole la altajn montojn, sed ankaŭ profundajn valojn. La hodiaŭa monda civilizacio estas kune kreita de la tutmondaj popoloj, la sciencoj kaj teknikoj estas komuna riĉaĵo de la homaro, ili ne devas esti monopoligitaj de iu individuo aŭ nacio. La sciencaj disertacioj devas esti publikigitaj en Esperanto, por ke ĉiuj nacioj havu egalrajtojn kaj ŝancojn ĝui ilin.”

Hoŭ ĜIPING
(El „El Popola Ĉinio“, n-ro 9/1988)

En la dua duono de aŭgusto 1988 en Pekino okazis la Dua Internacia Akademia Konferenco pri Sciencoj kaj Teknikoj en Esperanto, sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Por la ĉi-jara konferenco sin anoncis ĉirkaŭ 1300 fakuloj — sciencistoj, teknikistoj, geofizikistoj, kemiistoj, geologoj, ekonomiistoj, inĝenieroj, medicinistoj, farmaciistoj, matematikistoj — krom el Ĉinio ankaŭ el Hungario, Pollando, Sovetunio, Japanio k. a. La plejmulto de la prezentitaj prelegoj estas verkitaj speciale por la konferenco.

(El „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj“
N-ro 3—4/1988)

Al fakuloj pri medicino

En la itallingva svisa urbo Lugano okazos, 20—24.09.1989, la kvara mondkongreso pri psikiatrio de la frua infanaĝo kaj pri koncernaj sciencoj. La mondkongreson organizas loka grupo de Monda Asocio pri Psikiatrio de Frua Infanaĝo kaj pri koncernaj Sciencoj. Tiu asocio fondiĝis en 1980. Ties nuna prezidanto estas la usonano Robert N. Emde, kaj ties honora prezidanto estas Erik Erikson. Apartenas al ties estraro Serge Lebovici (Francio), Bertrand Cramer (Svislando), kaj aliaj konataj specialistoj.

La Mondkongreso estos dediĉita

al „Novaj Orientiĝoj pri la Frua infanaĝo“. Aparte, oni antaŭvidas jenejn temarojn: „Novaj orientiĝoj en psikobiologio“, „Novaj orientiĝoj en kliniko“, „Kulturaj variaĵoj kaj infana disvolviĝo“, „Novaj orientiĝoj en prevento kaj en terapio“, „Novaj orientiĝoj en la studo de netipaj evoluoj“.

La oficialaj lingvoj estas la angla, la franca kaj la itala.

Estus interese, se partoprenus ankaŭ Esperanton parolantaj kongresanoj, kiuj povus alporti la pruvon pri la kapablo de la Internacia Lingvo esti rekta interkomprenilo.

Se almenaŭ kelkaj parolantaj Esperanton specialistoj partoprenos, eblos organizi ion specialan por ili, kiu servu ankaŭ kiel ekzemplon de demokratia kaj efika interdisciplina scienca interŝanĝo.

Interesatoj petu la informilon en angla-franca-itala laŭ adreso: D-ro Tazio Carlevaro, Via A. Di Sacco 6, CH—6500 Bellinzona, Svislando.



Utila seminario

La atendoj lige kun la laŭvica junulara seminario de BEJ ne estis optimismaj. Personaraj ŝanĝoj kaj transiro de parto de la estraranoj de la junulara organizaĵo al pli respondecaj postenoj, restrukturado kaj formado de novaj societoj en la lando stariĝis la junularan movadon antaŭ multaj elprovoj. Simple, nenio speciala okazis, escepte de tio, ke junuloj el Bulgario partoprenis la junularan kongreson en Zagrebo kaj kelkajn aliajn aranĝojn eksterlande.

La propagando de la seminario estis ne-sufiĉa. Lige kun ĝia okazigo regis la malcerteco. Proksimume monaton antaŭ la fiksita en la plano dato oni ankoraŭ ne sciis, ĉu okazos la seminario aŭ ne. Ne estis preparitaj eĉ aliĝiloj.

Kaj tamen malgraŭ ĉio, la seminario bone sukcesis. Inter 26-a kaj 30-a de septembro de la kuranta jaro la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica akceptis ĉirkaŭ 20 partoprenantojn — 2 el GDR kaj po 1 el Sovetunio kaj Jugoslavio. La ĉeestantoj ne estis multaj, sed la seminario temo sendube estis interesa: „Junaj talentuloj en la E-kulturo“. Ĝi kaŭzis interesajn diskutojn kaj opiniojn.

La celo estis, ke la programo inkludu ne nur junajn talentulojn kiel speciala fenomeno en la E-kulturo, sed ankaŭ iujn el la fundamentaj ecoj de tiu kulturo. Ambicia tasko, malfacile solvebla en kelkaj tagoj. En unu el la bazaj prelegoj „Junaj talentuloj en la bulgara traduka kaj originala E-literaturo“ Georgi Miĥalkov tuŝis iujn problemojn el la historio kaj nuntempo de la E-kulturo ĝenerale. Dum la diskutoj oni esprimis la opinion, ke la junulara partopreno en tiu kulturo ne estas tiel signifa. Tio aparte koncernas iun el la plej gravaj komponantoj de la nuntempa amasa kulturo kiel la rok-muziko. Certe ne estas sufiĉaj la kelkaj rok-grupoj en Eŭropo, kiuj kantas kontentige ankaŭ en Esperanto.

Realismaj, eĉ akraj, estis la raportoj de

Ljubomir Trifonĉovski „Problemoj de la E-teatro“ kaj „Esperantista amatora arto“. Malgraŭ lia foresto la partoprenantoj havis la eblecon konatiĝi kun liaj raportoj. La problemoj de la E-teatro certe ne estas ignorendaj. Delonge La Esperanta kulturo forte tenas sin je Melpomeno. Ne estis facile fari teatron en nia movado, starante antaŭ la eterna dilemo — profesiaj aktoroj je malbona lingva nivelo aŭ bone posedantaj la lingvon amatoroj.

Kiel kaj kiamaniere ni faras amatoran arton kaj ĉu ni ne eraras ofte per tiu jam preta produkto, kiun ni prezentas sur la scenejon por doni estetikan ĝuon. Ne hazarde, kiam Mariana Elenova rakontis pri bonega, sed bedaŭrinde jam forgesita iniciato — la Infana Esperanta Teatro ekzistinta de 1977 ĝis 1980 ĉe dramteatro „Adriana Budevskaja“ en Burgas, ĉiuj partoprenantoj en la seminario interesiĝis, kie estas nun la tiamaj etaj aktoroj, sep el kiuj nun estas profesiaj aktoroj.

La seminario havis sian etoson, kiu multe ĉerpis el la bela aŭtuna vetero. Ke aŭtuno estas la plej ĉarma Rodopa sezono ĉiuj konvinkiĝis dum la bulgara vespero kun pikniko kaj dum la ekskurso ĝis v. Ŝiroka Lâka kaj Pamporovo. Pri la bona humuro kontribuis ankaŭ la anekdotoj de Kiril Velkov. Sed nature li ne estis inter ni nur por gajigi la partoprenantojn, sed por prelegi pri interesaj problemoj kiel: „Enigmoj de nia tero“, „Neidentigitaj flugantaj objektoj“, „Aŭtomata tradukado“.

Dum la ĉi-jara seminario el la eksa estraro de BEJ ĉeestis nur Mariana Elenova kaj Atanas Ilkov. Por unua fojo ĉeestis multaj el la nunaj aktivuloj de BEJ. Ni bondeziru al ili: ne lernu de la sukcesoj kaj eraroj de tiuj, kiuj estis antaŭ Vi. Simple provu krei ion propran!

Atanas ILKOV



Poetino de la vivĝojo

Dora Gabe estas unu el la plej interesaj, plej originalaj figuroj en la nuntempa bulgara literaturo. Naskita en 1888 en Nordorienta Bulgario, en familio de fama publicisto kaj sociaganto, ŝi finis mezlernejon en Varna kaj francan filologion en Grenoblo (Francio). Ŝia unua verskolekto „Violoj” aperis en 1908. Dum pluraj jaroj Dora Gabe estis redaktoro de porinfanaj revuoj, prezidantino de la bulgara PEN-centro, membro de la Nacia Pacdefenda Komitato, diplomato en Varsovio... Sed ŝi neniam ĉesis verki — poemojn, rakontojn, novelojn por infanoj kaj por plenaĝuloj. Ŝi estas aŭtorino de poemo pri la bulgara nacia heroino — la esperantistino Vela Peeva. Altvaloras ŝiaj tradukoj el la pola literaturo.

Dora Gabe forpasis en 1983 estante jam preskaŭ centjarulino. Kaj ĝis la fino de ŝia vivo ŝi ne forlasis siajn literaturajn okupojn,



verkis entuziasme. Karakterizaj trajtoj de ŝiaj lastaj poemkolektoj („Atendu, suno!”, „Nevideblaj okuloj”, „La mondo estas mistero” kaj „Profundaĵoj”) estas freŝeco de la poeziaj bildoj, originaleco kaj profundo de la penso. En ŝiaj porinfanaj verkoj, precipe en la ĉarmegaj poemoj, mankas didaktiko, ili estas plene adaptitaj al la infana mondo.

Multaj poemoj de Dora Gabe estas tradukitaj en fremdajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Ĉi tie ni prezentas al vi novajn tradukojn el ŝia intima poezio.

TELEPATIO

*Jen mano nevidebla
ektuŝis mian ŝultron...
Kaj tuj aperis en memoro mia
persono, jam delonge forgesita,
kaj antaŭ mi ekstaris.
Ĉu estis lia penso
al mi fluganta
tra la tempo,
en spacon transformita?*

*Ĉu estas ĝi la sorĉistino-penso?
Ĝi — pli rapida ol la lumo,
pli observema ol okuloj niaj,
pli perceptebla ol la tuŝo
de niaj manoj?
Jen ĝi transformis mian rememoron
en imagon vivan!*

*Ho, iam ĝin malkovros la scienco,
videbla kiel la ĉielo estos,
kaj klara kiel la muziko,
sed kiel do atingos tiu penso
la fundon de animoj niaj,
kie restigis ĝermon
la eterneco?*

*Silento regas nun en mia ĉambro.
Silentas kaj la muroj, kaj la aĵoj.
Kaj viva estas tie ĉi nur mi,
la bild-imag' pri vi,
kaj ĉi-sekreto,
kiun scienc'nenia ja malkovros...*

ALVOKO

*Vi venu helpi min!
Mi nun bezonas forton
por esti jam kvieta.
Mi nun bezonas vian manon,
por elkonduki min
el mia maltrankvila voj'!*

*Vi venu, sed ne plu ripetu,
ke mia sorto estas
kubute rompi
la silenton —
subfosi bordojn onde!*

*Kvietan mi kareson volas —
samkiel de birdet' kovanta, —
do, mi scivolos
de kie prenis ĝi humilon sian,
por ke fariĝu mi humila,
por ke ne estu nesufiĉa
por mi la trankvilec' eterna,
kiam atingos mi la finon...*

* * *

*Ne tuŝu min,
ĉar via mano brulvundiĝos
en flam' nefinbrulinta,
en varm' ne plene disdonita,
en la silento densa,
ardigita,
en kiu kaŝdormetas
espero mia,
matura kaj naiva:
pri nasko nova,
pri renkontiĝo nia...
Ne tuŝu min!*

* * *

*Ne, ne foriru vi kolera!
Sur kiun falos ja kolero via?
Vi venu kaj elverŝu ĝin sur min.
Ja tio ĉi almenaŭ estas io,
almenaŭ estas ĝi tuŝeto,
ĉeesto nevidebla
kaj alvoko!*

*Ho, tiun ĉi silenton posteksplodan,
malplenigitan de koler' kaj amo —
alvenu vi kaj ĝin forpelu!*

Tradukis: Venelin MITEV





Portnoj, Josif: „Esperantista kontribuo por amikeco kun Sovet-Unio“ (dulingva — en Esperanto kaj en la bulgara lingvo). Tradukis el la rusa en la bulgaran kaj en Esperanton: Nikolao Brezin. Redaktis: Hristo Gorov. Eldonis: Bulgara Esperantista Asocio. Ofsetprezo de BEA, 1988, 228 p.

La sovetaj historisto docento Josif Portnoj el Karaganda (Kazaĥa SSR) estas konata al la bulgaraj esperantistoj kaj legantoj de „BE“, ĉar li publikigis en nia revuo vicon da artikoloj pri la ligoj inter sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj.

Kvankam ne-esperantisto, doc. Portnoj kiel historiisto ekinteresiĝis pri la agado de sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj sur la fono de amikaj rilatoj inter la popoloj de Sovet-Unio kaj Bulgario. Tiucele li obstine kaj pacience longan tempon okupigis pri elserĉado de dokumentoj en la arkivoj de USSR kaj Bulgario, de publikigitaj materialoj kaj rememoroj de veteranoj de la laborista kaj sindikata movadoj en ambaŭ landoj.

La libro konsistas el du ĉapitroj:

I. La frataj internaciaj ligoj inter la kazaĥaj kaj bulgaraj labo-

PROFUNDA STUDO

ruloj dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj kaj II. La amikeco kaj la kunlaborado inter la laboruloj de Kazaĥa SSR kaj Bulgario en la nuntempa etapo.

En la unua ĉapitro doc. Portnoj prezentas interesajn donitaĵojn pri la komenca evoluo de la E-movado en Kazaĥio. En la nomaro de la unua milo da esperantistoj, publikigita de Zamenhof en aparta adreslibro (1889), en Mez-Azio, inkluzive Kazaĥion, troviĝis kvar esperantistoj. En 1909 en tiu regiono estis fondita la unua propagandista E-grupo. Komence de la XX jc. Esperanto atingis certan disvastiĝon inter la loka intelektularo: kuracistoj, gimnaziaj instruistoj, fervojaj oficistoj. En septembro 1923 okazis Mez-Azia Fonda Esperantista Kongreso. En entrepreno, institutaj kaj lernejoj estis fonditaj studrondoj de Esperanto. Sukcese funkciis E-rondo de la telegrafpoŝtistaj oficistoj en Orenburgo. Alia rondo estis fondita en la Orenburga Zooteknika Faklernejo.

Helpe al la bulgara popolo post la kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923 la laboruloj de la Kazaĥa SSR organizis vastan kampanjon por klasa solidareco kun la bulgara laborpopolo, kun la batalantoj por libero. La membroj de la E-rondeto en la Orenburga Zooteknika Faklernejo vizitadis sovetojn kaj kolhozojn en la respubliko por kolekti monrimedojn helpe al la bulgaraj laboruloj.

La internaciaj ligoj inter Kazaĥio kaj Bulgario vastiĝis kaj firmiĝis dum la jaroj de socialisma konstruado en USSR. Komenciĝis vigla korespondado malgraŭ la strikta kontrolo kaj konfiskado de la korespondadoj venantaj el Sovet-Unio. Tial la sovetaj esperantistoj fine de la 20-aj kaj komence de la 30-aj jaroj direktis siajn leterojn al Bulgario pere de siaj korespondantoj en Germanio, Francio, Britio kaj aliaj okcidentaj landoj. La bulgaraj proletaj esperantistoj lerte uzis la leterojn de

la sovetaj esperantistoj kiel akran armilon en la batalo kontraŭ la faŝisma reĝimo.

La sovetaj E-periodaĵoj „La nova epoko“ kaj „Internacia Lingvo“ publikigis komence de la 30-aj jaroj poemojn kaj rakontojn de Hristo Gorov.

Dum la 30-aj jaroj Sergej Boev, estonta akademiano pri veterinaro medicino kaj liaj kamaradoj-esperantistoj aktive kaj vigle korespondadis kun bulgaraj esperantistoj, membroj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA). Ili propagandis la gravajn atingojn de Soveta Kazaĥio kaj interŝanĝis sciencajn informojn. La juna sciencisto Boev publikigis en la eldonata en Bulgario de Georgi Popivanov esperantlingva „Internacia Veterinara Revuo“ kelkajn sciencajn artikolojn. Ili estis la unuaj publikigaĵoj de kazaĥaj sciencistoj eksterlande, per kiuj oni propagandis la atingitajn dum tiuj jaroj sukcesojn en la disvolvigo de la brutbredado en Kazaĥio. Siaflanke bulgaraj sciencistoj sendis al S. Boev kaj liaj kolegoj bulgarlingvaj lernolibroj, atlasojn, sciencajn verkojn pri helmintologio, parazitologio, biologio.

Tiutempe la vaste aplikatan en USSR metodon de socialisma konkurado utiligis ankaŭ la organizaĵoj de BuLEA. La esperantistoj el Stara Zagora konkuris kun la esperantistoj el Stanimaka (nun Asenovgrad), el Stanimaka — kun Lom k. t. p.

En la dua ĉapitro la aŭtoro traktas la amikecon kaj kunlaboradon inter la laboruloj de Kazaĥa SSR kaj Bulgario en la nuntempa etapo. Dum la unuaj postmilitaj jaroj, post 1945, la gvidantoj kaj la veteranoj de la bulgara revolucia E-movado energie okupiĝis pri restarigo kaj evoluigo de la ligoj kun sovetaj esperantistoj. Al tio kontribuis la renkontiĝoj en Moskvo kaj Sofio kun plej elstaraj esperantistoj el USSR: doc. Semjon Podkaminer, prof. Eŭgeno Bokarev, akad. Gurgen Sevak, Petro Poliŝ-

ĉuk, Konstantin Gusev, akad, Sergej Boev k. a.

Arda propagandanto de la bulgara belliteraturo estas la esperantista sekcio de la Kazaha Societo por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. Laŭ ĝia iniciato en la Kazaha Universitato „S. M. Kirov” en februaro 1985 estis organizita


vespero dediĉita al la 80-jariĝo de Tr. Hristovski, flama publicisto kaj aktiva aganto de la bulgara revolucia E-movado.

Fine de sia studo la aŭtoro konkludas, ke la frataj ligoj de sovetaj esperantistoj, inkluzive kazahaj, plivastiĝas kaj estiĝas ĉiam pli utilaj.

La libro „*Esperantista kontribuo*

por amikeco kun Sovet-Unio” de doc. J. Portnoj estas zorgeme tradukita kaj redaktita. Ĝi estas profunda kaj valora studo de nekonataj facetoj de la intimaj ligoj inter bulgaraj kaj kazahaj esperantistoj sur la fono de la amikeco kaj kunlaboro inter la bulgara kaj sovetaj popoloj.

Evgeni GEORGIEV



Petras Cvirka, *Koko Kantisto Kokerikisto*. El litova lingvo

MIRINDAJ FABELOJ

tradukis Adomas Vaitilavičius. Ilustris Taida Balčiunaite. Eldonejo Vyturys, Vilnius, 1987.

„Alflugis pego, eksidis sur pinton de abio, balancas sin kaj kantas:

La abion tuj mi hakos
Falos ĝi kaj forte krakos,
El ĝi majstros mi bastonon —
Ne atendu la pardonon.

Pretere kuris leporo, ekaŭdis la parolon kaj preskaŭ svenis. La mizerulo tiel ektimis, ke laŭ plena forto kuris. Renkontis li lupon.

Kaj kio okazis poste? Tion ĉi vi povus ekscii traleginte la fabelon „Kiel pego abion hakis” en la tradukita en Esperanton libro por infanoj „Koko Kantisto Kokerikisto” de la litova verkisto Petras Cvirka.

La libro enhavas ankoraŭ du fabelojn — „Ruzajoj de vulpo” kaj „Pri Koko Kantisto Kokerikisto kaj liaj infanoj”, en kiuj la juna leganto

renkontiĝos kun jam delonge konataj herooj de la porinfana literaturo.

Evidente, la tasko de la tradukinto Adomas Vaitilavičius ne estis facila, unue, pro la stila koncizeco kaj tutplena klareco de la originalo kaj due, pro tio, ke ĝi abundas je belsonaj rimoj. Sed la tradukinto sukcese venkis la obstaklojn kaj prezentas al ni en Esperanto mirindajn fabelojn.

Ĉe similaj eldonoj tre grava estas la arta aranĝo, la kunligo de interesa teksto kaj amuzaj desegnaĵoj. La pentristino Taida Balčiunaite proponas al la etaj legantoj belajn kaj spritajn kolorpentraĵojn.

Do, niaj litovaj samideanoj donis, laŭ mi, valoran kontribuon al la porinfana tradukliteraturo en Esperanto. Ili donacis al la plej junaj amikoj bonegan libron, kiun ili nepre tralegos kun granda intereso.

Venelin MITEV

Artikolo pri Esperanto en Soveta enciklopedio

Enciklopedioj ludas gravan rolon por pliriĉigo de la homaj konoj. Do publikigo de artikolo pri Esperanto en ĝenerala aŭ specialigita enciklopedio ege kontribuas por informado de la vasta publiko pri nia lingvo. Tial kun plezuro mi tralegis la artikolon „Artefaritaj lingvoj” en la ruslingva Enciklopedia Vortaro de la Juna Filologo (lingvistiko) por la meza kaj alta lerneja aĝo, eldono de Eldonejo „Pedagogika”, Moskvo, 1984, 352 paĝoj, 27×17 cm, eldonkvanto de 500 000 ekz. Ĝia aŭtoro estas la konata sovetia interlingvisto kaj esperantologo V. P. Grigoriev.


En la artikolo (paĝoj 117 kaj 118) la aŭtoro skribas, ke „krom la kelkajn milojn da naturaj lingvoj sur la nuntempa mapo de la mondo delonge oni povas malkovri ankaŭ centojn kaj konsiderindajn regionojn de disvastigo de artefaritaj lingvoj”. Post karakterizo de la artefaritaj lingvoj li donas kiel ekzemplojn de internaciaj helplingvoj Esperanton, Volapukon, Idon, Interlingua-n, Novial. La pliparto de la artikolo ta-

men estas dediĉita nur al Esperanto. La aŭtoro informas pri la historio de Esperanto, pri ĝia kreinto d-ro L. L. Zamenhof, pri la strukturo kaj leksiko de la lingvo; prezentas ekzemplojn, pruvantajn la eblecojn de la lingvo esti instrumento de arta kreado (ekz. literaturaj verkoj en Esperanto, esperantaj tradukoj de poeziaj kaj prozaj verkoj el la rusa kaj monda literaturo k. t. p.). Estas emfazita la aktiva partopreno de la esperantistoj en la pabatalo.

Fine de la artikolo estas donitaj kelkaj esperantaj frazoj kun traduko en la rusan lingvon.

La artikolo de Grigoriev en Enciklopedia Vortaro de la Juna Filologo kontribuos por korekta informado pri Esperanto de la junaj generacioj. Mi rekomendas la vortaron al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri lingvistikaj problemoj.

Dimităr HAĜIEV



300 jaroj de la ribelo de Ĉiprovc

La ribelo de Ĉiprovc, okazinta en 1688 estas la plej granda ribelo en Bulgario kaj sur la Balkanoj dum la XVII jc. Ĝi estas la plej signifa provo dum la unuaj 3 jarcentoj de la Otomana regado sur niaj teritorioj per armiloj forigi la fremdan tiranecon.

XVII jc prezentas turnopunkton ne nur en la bulgara, sed ankaŭ en la balkana kaj la tuteŭropa historio. En la Otomana Imperio ekestas regreso, akriĝas la antagonismoj kaj malfortiĝas ĝia militpotenco. Rezulte de tio plifortiĝas la ekspluatado kaj la subpremado de la sklavigitaj popoloj. La malkontenteco kreskas, naskiĝas la ideo pri perarmila rezisto.

La Ribelo de Ĉiprovc ne estas hazarda kaj izolita fenomeno en la vivo de la bulgara popolo. La militoj de Aŭstrio kaj Venecio, finiĝintaj per la granda milito dum 1683—1699, alportas seriozajn sukcesojn al la unuigintaj kristanaj ŝtatoj kaj naskas esperojn ĉe la sklavigita loĝantaro. Eksplozas kelkaj ribeloj, inter kiuj plej gravaj estas: la Dua ribelo de Târnovo, la Ribelo de Ĉiprovc kaj la Ribelo de Karpoŝ. Pro diversaj kaŭzoj plej forta estas la ribela incendio en Ĉiprovc-regiono. Dum XVI—XVII jc la soci-ekonomia disvolviĝo de tiu ĉi regiono estas pli intensa. En Ĉiprovc la metioj, speciale la artaj metioj kaj la minekspluatado, disfloras. La komercistoj proponas en malproksimaj landoj belegajn ellaboraĵojn el oro kaj arĝento, majstre ellaboritajn kupraĵojn kaj feraĵojn. La loĝloko ĝuas certan lokan aŭtonomion, la loĝantaro estas libera, kun vigla nacia memkonscio. Loĝantoj de Ĉiprovc, finintaj siajn studojn en eksterlando, revenas sian naskiĝlokon kaj komencas vastan kulturen kaj klerigan laboron. Forta esprimo de la nacia memkonscio estas la politika kaj kultura agado de la kleraj por sia tempo bulgaroj-katolikoj. La populaj agantoj Petâr Parĉevič, Petâr Bogdan kaj aliaj disvolvas vigan politikan agadon, serĉas kontaktojn kun la landoj batalantaj kontraŭ la Otomana Imperio, ili preparas la grundon por perarmila batalo. La loĝantoj de Ĉiprovc ne nur sopiras al libero, ili preparas sin batali por ĝi.

Kuraĝigitaj de la sukcesoj de la Aŭstria armeo, kiu konkeris Beogradon la 6-an de septembro 1688, ok ribelataĉmentoj formitaj en Ĉiprovc kaj en kelkaj aliaj loĝlokoj en Nordokcidenta Bulgario direktiĝas al Kutlovica (nun Miĥajlovgrad). Ilin gvidas Georgi Pajaĉevič, Bogdan Marinov, Ivan kaj Miĥail Stanislavovi, Luka Andrejnin k. a. La ribeluloj batalas kontraŭ turkaj trupoj kaj disbatas ilin. Dum mallonga tempo la bulgaroj travivas la ĝojon pro la venko. En Ĉiprovc estas lokitaj la ĉefaj fortoj de la ribeluloj. Ili konkeras Kutlovica kaj Berkovica, kie estas koncentritaj la turkaj milittrupoj. Tamen la aŭstraj trupoj ĉesigas sian antaŭenmarŝon, kio ebligas al la turka aliancano, la hungara grafo Emerih Tekeli, per la helpo de paŝao Legen Osman, subite ataki la ribelulojn. Suferinte grandajn perdojn, ili retiriĝas al Ĉiprovc. La decida batalo okazas en la loko Ĵeravica, kie pereas miloj da ribeluloj. Post mallonga brava kontraŭstaro Ĉiprovc falas en la manojn de la malamiko. La ribelo estas kruele frakasita. Plenaĝuloj kaj infanoj estas senkompatemurditaj aŭ sklavigitaj, la florantaj loĝlokoj estas plene neniigitaj. La pli granda parto de la restintaj vivaj bulgaroj elmigras Valaĥion kaj Hungaron.

Malgraŭ sia tragedia fino la Ribelo de Ĉiprovc ludis gravan rolon en nia liberiga movado. Ĝi montris al la mondo, ke la bulgaroj ne paciĝis pri sia sklava sorto, pruvis ilian pretecon pri sinofero en la nomo de la plej supera homa rajto — la libereco, longan tempon antaŭ ol la Aprila Ribelo en 1876, kiu altiris la atenton de la eŭropa publika opinio al la sorto de la bulgara popolo.

La plua historio de Ĉiprovc pruvas la nepaciĝemon de ĝiaj loĝantoj al la sociaj maljustaĵoj kaj politika subpremado. Ilia partopreno en la revoluciaj eventoj de 1923 kaj 1944 parolas pri la vivanteco de la revoluciaj tradicioj en tiu regiono.

Ljubka NIKOLOVA,
prezidantino de E-societo
„Septemvrijska Slava” — Miĥajlovgrad

Foto de la numero: Belego el Ĉiprovc

Foto: Kirilka SAVOVA

SOMERAJ INTERNACIAJ KURSOJ EN PISANICA

Jam duan jaron en Pisanica oni organizas tri kursojn dum la du someraj monatoj — de la 1-a ĝis la 20-a de julio kaj de la 10-a ĝis la 29-a de aŭgusto — por plenkreskuloj kaj de la 21-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto — por lernejanaro. La diferenco estas ne nur en la aĝo de la kursanoj, sed precipe en la programoj de la kursoj.

La lernejanaj grupoj havas po 2—3 studhoroj tage. Ili havas la eblecon aŭ komenci lerni la lingvon, sen fari ekzamenon en al fino de la kurso, aŭ fini la matematikon, kiun oni lernis en al fakultativa grupo kaj fari ekzamenon pri la koncerna grado.

Kvankam la oficistoj de IEK dissendas la programon de la kursejo al ĉiuj societoj, ŝajnas, ke ne ĉiuj el ili informas la esperantistan kaj neesperantistan publikon en sia regiono pri la someraj kursoj. Pli insiste oni devas propagandi pri la julia kaj lernejana kursoj, ĉar ili funkcias de 2 jaroj kaj ankoraŭ ne estas sufiĉe popularaj.

Ĉi-somere la kursojn partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj, inter kiuj lernejanaro preskaŭ mankis. El tiuj partoprenantoj 23 ne sukcesis fari ekzamenon. La kaŭzoj pri tio estas diversaj. Por kelkaj la lernado de lingvo ĝenerale estas malfacila. Sed kulpas ankaŭ esperantistoj, kiuj ĉiam ankoraŭ reklamas Esperanton kiel tute facila lingvo, kaj tio kondukas al la penso, ke ĝin oni povas ellerni sen multe da penoj. Jes, Esperanton oni povas ekparoli post 2—3 semajnoj, sed nur se oni tute serioze kaj insiste lernas dum tiuj du semajnoj. Bedaŭrinde, venas al la kursoj homoj, kiuj opinias, ke vizitinte 3—4 lecionojn en tiu 20-taga periodo, ili jam posedas la lingvon, kaj eĉ en tia grado, ke ili povos poste instrui ĝin al aliaj.

Ofte la kursanoj plendas, ke en niaj kursoj oni multe instruas gramatikon kaj ili tute sincere proponas ne instrui ĝin. Tio similas al eventuala propono lerni matematikon sen koni la numeralojn kaj simplajn operaciojn per ili — adicon, subtrahon, dividon kaj multoblighon. Sed kiu riskus fari similan proponon? Kaj se temas pri instruado de la gramatiko, verŝajne oni devas starigi ne la demandon ĉu instrui ĝin, sed — kiel ĝin instrui.

Multaj kursanoj en dua kaj tria gradoj demandas: „Kial oni ne instruas al ni laŭ la Ĉe-metodo? Jes, krom multaj aliaj plusoj, la Ĉe-metodo estas bona allogilo de komencantoj. Sed la demandintoj verŝajne eĉ ne supozas, ke laŭ tiu metodo oni instruas nur al komencantoj, ke eĉ la kunlaborantoj de Ĉe-instituto en Rotterdamo ĝis nun ne proponis programon por progre-

sintoj, kaj por instruistoj, kiuj preferas labori laŭ tiu ĉi metodo restas nur la ebleco apliki apartajn momentojn de ĝi en apartaj lecionoj en dua kaj tre malofte, dum konversaciaj lecionoj — en tria grado.

Ankoraŭ pli ofte aŭdeblas propono ne klarigi gramatikon en Esperanto (temas pri dua grado). Sed en bulgara lingvo oni ja klarigas ĝin en unuagrada kurso. Kial ripeti ĉion bulgare? Pli serioza estas la propono ne postuli la citadon de la reguloj, sed ilian klarigon de la kursanoj kaj aplikon en konversacio. **Kaj tio dependas de la sperto de la instruisto** kaj estas la ĉefa tasko de ĉiu instruisto fari tion. Tio estas tasko ankaŭ de la estontaj instruistoj, kiuj ankoraŭ estas lernantoj.

La plendoj de la IR- grupo (instru-rajta grupo) estas plej seriozaj — ilia programo estas sufiĉe vasta kaj peza — metodiko, historio de la movado kaj literaturo. Metodikon oni ne povas ne instrui — tio ja estas bazo por estontaj instruistoj. Ankaŭ historion de la movado kaj literaturon estas necese koni, ĉar ĉu instruisto povas esti vere bona sen tiuj konoj? Subteninda estas la propono de la kursanoj farita en la enketo de la Komisiono pri Instrua kaj scienca Agado (KISA) ĉe BEA. La plimulto el ili opinias, ke estus bone eldoni du broŝurojn — pri metodiko kaj pri historio kaj literaturo, kiujn la estontaj kursanoj povus aĉeti anticipe de BEA, trastudi ilin kaj tiel la streĉo dum la kurso estus ne tiom alta kaj la duono de la studhoroj povus havi seminarian karakteron. Ĉar ni bezonas ne tre grandan kvanton de ili, verŝajne estas senco proponi al UEA parton. Oni povas objeti, ke ekzistas la Gvidlibro por supera ekzameno, sed ĝi ne troveblas ofte. Krom tio, la metodika parto en ĝi devas esti iom aktualigita. Al la literatura parto devus esti aldonita legolibro — ja ne ĉiam ni povas trovi verkojn de diversaj aŭtoroj. Kaj ja koni almenaŭ po unu-du verkojn aŭ eliraĵojn de ili estas necese ne nur por la estontaj ĝeinstruistoj.

Konklude mi volas substreki, ke ĉi-somere en la Kursejo estis tre altnivela instruistaro. Eĉ en la aŭgusta enketo la postulemon de la instruistoj la kursanoj notis kiel grava kaj necesa. Preskaŭ ĉiuj estis kontentaj pri la labormaniero de la instruistoj.

Libertaria MLADENOVA



La aŭstraliaj esperantistoj (meze de la unua vico) gastas al siaj sofiaj gesamideanoj.

Salutojn el Aŭstralio!

Post la Jubilea Kongreso en Varsovio — 1987, Sheila kaj Bill Leah (ŝi — eksinstruistino kaj li — verkisto, perdinta siajn krurojn dum la Dua Mondmilito) vizitis Bulgarion.

En sia letero de la 29.10.1987 Bill Leah skribis: „Mi verkis artikolon pri nia vizito en via lando. Ĝi estis publikigita en nia Esperanto-gazeto, kiun oni nomas „Telopeo“. Tio estas aŭstralia floro, kiu estas simbolo de nia ŝtato. Ĉiu el la ses ŝtatoj de nia lando publikigas sian propran gazeton, kutime uzanta kiel titolon la ŝtatsimbolon”

Al la sofiaj esperantistoj Bill Leah dediĉis du tajpi-tajn paĝojn:

TRANS LA LINGVA BARILO

„En Aŭstralio, ni malofte aŭdas pri Bulgario. Kaj pro tio, nemulte da aŭstralianoj pensas viziti vian landon.

Nur ĉar ni havas plumamikinson, ni decidis viziti Sofion post la 72-a Universala Kongreso en Varsovio. La Esperanto-broŝuro de „Balkanturist“, kiun ni ricevis responde al nia peto, post kiam ni legis pri ĝi en revuo

„Esperanto“, donas informon pri la vidindaĵoj, sed ne indikas kiom kostas feriado tie. Kaj la lingvo estas tute fremda al ni. Eĉ la alfabeto estas stranga kaj fakte enigma... Nek niaj bankoj, nek niaj ĵurnaloj povas informi nin pri la valuto... Kiel do ni povus scii, ĉu ni havos sufiĉe da mono por ferii en tiu fora lando?

Tamen, kun fido je nia amikino Marija Angelova, ni kuraĝis viziti landon, pri kiu ni sciis malmulte.

Alveninte al la flughaveno en Sofio, ni trapasis la pasportan kontrolon rapide kaj senĝene; la doganoficisto ne inspektis niajn valizojn. Ni trapasis la formaladojn pli facile ol ni povus tion fari enirante en nian propran landon!

Ce la elirejo nin renkontis Marija kaj ŝia edzo, kaj grupo de aliaj esperantistoj, kiuj portis florojn por ni. Ekde tiam, ni sentis nin hejme en Bulgario.

Marija kaj Ivan manĝigis nin en sia hejmo. Ili kondukis nin por trarigardi la vidindaĵojn. Ili mendis taksojn por ni kaj aĉetis biletojn, kiam ni veturis en aŭtobuso — kaj foje en aviadilo. Ili prizorgis nin ĉie, kie ni vojaĝis tra Bulgario.

Sed ni trovis, ke ankaŭ la neesperantistoj en tiu lando estas afablaj kaj helpemaj. La junuloj estas ĝentilaj kaj kondutas digne kaj respekteme. Ni dezirus, ke ni povu diri al ili kiel alte ni aprezas tion, kaj pro tio ni bedaŭras, ke ekzistas lingva barilo.

Foje dum nia vizito, ni kuraĝis eliri el nia hotelo sen la helpo de Marija. Ni vizitis la Kristalan Muzeon. Kaj tie ni lernis, kiel malfacile estas komunikiĝi kun alilandanoj sen la helpo de Esperanto aŭ Esperanto-ĉifero. Oni disponigis al ni ĉiĉeroninon, kiu parolas la francan, kiu lingvo estas ne tute fremda al ni, kvankam ni ne parolas ĝin bone.

Pli ĝoja renkontiĝo estis dum nia vizito al la E-grupo de Sofio. Ni denove renkontis tie Steffa Ĉenkova, kiun ni unue renkontis en Budapeŝto, kaj kiu estis inter la grupo, kiu bonvenigis nin ĉe la flughaveno. Vi havas en ŝi vigan kaj laboreman samideaninon. Ni bedaŭras, ke ni ne havis pli longan tempon por paroli al ĉiu el la grupanoj. Sed, estis interese renkonti tie esperantistojn el Vjetnamio kaj Latvio. Al la membroj de la Sofia Esperanto-grupo, la membroj de nia malgranda grupo en Gunedah sendas bondeziron.

Mi mem ne trovas sufiĉe taŭgajn vortojn por priskribi nian ĝojon kaj belajn rememorojn. Mi nur povas diri al Marija kaj al vi ĉiuj, elkoran dankon".

Bill LEAH.

KION NI EKSCIIS DE LA AŬSTRALIAJ AMIKOJ

Interesajn faktojn proponas al ni Sheila Leah en sia letero de 2.01.1988: „La Esperanto-klubo en Gunedah plantis arbon en parko por memori la jubileon de Esperanto. Krome ni prezentis al la biblioteko la libron „Zamenhof — kreinto de Esperanto“ verkita angle de Marjorie Boulton. Ni renkontiĝis en restoracio por festi la Zamenhofan vesperon per vespermanĝo. Bill montris la fotojn de la kongreso en Varsovio kaj kun vi en Sofio kaj Rila-monaĥejo. Li parolis pri la feliĉaj tagoj en Pollando kaj Bulgario...”

Plaĉas al mi aŭdi, ke vi vidis pri la Bulgara Televido bildojn de bestoj de Aŭstralio. Antaŭ ne longe ni vidis en nia televido Rila-monaĥejon. Estis programo pri

belaj montaraj pejzaĝoj en Eŭropo kaj pri belaj malnovaj konstruaĵoj.

En Aŭstralio en 1988 oni festas la ducentjaran datrevenon de post kiam la blankuloj venis por loĝi ĉi tie. Mi supozas, ke ducent jaroj ŝajnas nenio al vi kaj al la plejmulto de la eŭropaj popoloj. Tamen ja ĉiu devas komenci. Multaj festaj aferoj okazos dum la tuta jaro kaj ĉie tra la lando. La indigenaj aŭstralianoj loĝis ĉi tie dum kvardek mil jaroj. Ili havas interesan historion kaj multajn belajn legendojn. Bedaŭrinde, okazis multaj miskomprenoj inter blankuloj kaj indigenoj, ĉar ili estas tre malsamaj. Indigenoj suferis multajn malĝojajn tagojn. Nuntempe la afero pliboniĝas. Ni esperas, ke tiu tendenco daŭros plu. Ni ne povas ŝanĝi la pasintecon, sed ni devas peni ne fari denove la samajn erarojn.

Hieraŭ nokte ni rigardis televidan programon pri la komenco de la festado, en kiu oni vizitis multajn malproksimajn regionojn de Aŭstralio, ekzemple lumturon sur malgranda insulo, vilaĝon en la okcidento, kie loĝis nur ses homoj, virinoj, kiuj administras kafejon por la veturigistoj de kamionoj sur longa vojo, malproksime de loĝataj lokoj. La programo eĉ vizitis grupon de sciencistoj, kiuj laboras en la Antarkta regiono. Estas junulo en la grupo, kiu foriris el Aŭstralio antaŭ ol lia bebo naskiĝis. Do la televido aranĝis, ke la edzo, la edzino, la malgranda filo kaj la nova bebo aperis sur la ekrano, kaj ili povis paroli unu al la alia.

Ankaŭ la programo prezentis homojn en aliaj lokoj de la mondo — eĉ la du rusajn kosmonaŭtojn en la spaco, Titov kaj Manarov en la spacoŝipo „Glavkosmos“. La kosmonaŭtoj parolis kaj bondeziris al Aŭstralio feliĉan naskiĝtagon. Rusa sinjoro en Moskvo interpretis.

Prezidentoj kaj ĉefministroj el aliaj landoj parolis ankaŭ kaj diris „Feliĉan naskiĝtagon“. Estis tre interese kaj estis tre lerta teknika afero.”

Mi bondeziras al la samlandanoj de Sheila kaj Bill vivi en paco kaj bona interkompreniĝo por prospero de Aŭstralio.

Marija P. ANGELOVA

OPINIO

MI PROPONAS

Mi esperantiĝis antaŭ dudek jaroj. Nun mi havas 48 korespondantojn el 25 landoj, inter ili Sovetunio, Brazilo, Aŭstralio, Portugalio, Grekujo, Francio, Nederlando, Usono k. a.

Ĝis nun mi ricevis de ili multajn ilustritajn esperantajn, kiuj konatigis min pri iliaj landoj, urboj, monumentoj.

Luj miaj gekorespondantoj konfesas al mi, ke ili preskaŭ nenion scias pri Bulgario. Luj scias malmulte, sed la informoj ne kontentigas ilin. La plimulto volas scii pli da detaloj pri niaj lando kaj ĉefurbo. Bedaŭrinde, mankas konvenaj materialoj en Esperanto. Do, mi kaj

aliaj samideanoj estas devigitaj serĉi tiajn materialojn, tradukitajn en anglan, francan kaj germanan lingvojn. Mi sukcesis trovi gvidlibron pri Sofio en angla, franca kaj germana lingvoj. Estas aĉetebla ankaŭ la libreto „Bulgario hodiaŭ“ en franca lingvo kaj „Per aŭto tra Bulgario“ en germana lingvo.

Mia korespondantino el Nederlando Mariet Hoogeland volis scii pli detale pri nia fame konata urbo Gabrovo kaj ties anekdotoj. Feliĉe ŝi scipovas la anglan kaj mi sendis al ŝi gabrovajn anekdotojn en la angla.

Kial la supre menciitaj libroj

ne estas troveblaj en Esperanto? Ne ĉiuj miaj gekorespondantoj regas aliajn lingvojn krom Esperanto. Do, laŭ mia opinio, nepre devas esti troveblaj broŝuroj, albumoj, faldfolioj, bildkartoj en Esperanto, por ke ĉiuj esperantistoj povu aĉeti kaj sendi ilin al siaj gekorespondantoj.

Antaŭ kelkaj jaroj estis eldonita la libreto „Ĉu vi konas Bulgarijon?“. Ankaŭ ĝi povus esti reeldonita.

Stanka DIMITROVA,
estranino de E-societo
„Nikola Ŝopov“ — Sofio



AFRIKO. La Esperanto-Instituto de Zairio en 1988 notas sian 25-jaran datrevenon.

Dum la lastaj jaroj (inter 1984 kaj 1987) en Zairio pli ol 700 personoj en Zairio lernis Esperanton. Zairaj esperantistoj partoprenis la Jubilean Universalan Kongreson en Varsovio. Post la kongreso en la lando okazis prelegoj kaj kursoj (unua- kaj duagrada) en diversaj lernejoj, kolegioj, superaj institutoj kaj junularaj asocioj.

* * *

En la konferenceto de la Nacia Biblioteko en Abiĝano (**Ebura Bordo**) Antoine Kouassi Kouablan, kun la helpo de Gérard Paing el Francio, aranĝis konferencon pri Esperanto. Partoprenis pli ol 60 personoj. Okazis tri prelegoj: „Kio estas Esperanto?” (G. Paing), „Esperanto en Afriko” (A. Kouablan) kaj „La Esperanto-movado en Ebura Bordo” (A. Darga). Grandaj ĉiutagaj gazetoj intervjuis la prelegintojn.

AŬSTRALIO. Aperis „Aŭstralia Antologio”. Redaktoro — Alan Towsey. Eldonis: Edistudio, Pizo 1988. Serio Oriento-Okcidento 24—432 paĝoj, 21 cm., lukse lede bindita. Antaŭparoloj de Humphrey Tonkin, Ralph Harry, Alan Towsey. Prezo — 75 ned. gld. Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

AŬSTRIO. En urbo Grein, situanta ĉe Danubo, 130 km okcidente de Vieno, oni inaŭguris placon „Esperanto” — sub la impona mezepoka kastelo apud Danubo. La ĉirkaŭ 100 partoprenantojn salutis la urbestro Heinzl. En la nomo de la aŭstra esperantistaro parolis d-ro H. M. Maitzen, prezidanto de Aŭstria Laborkomitato „Esperanto Centjara”.

BRAZILIO. En Kuriĉibo (suda Brazilo) de januaro ĝis aprilo ĉi-jare estis organizita granda ekspozicio „Esperanto — 100-jara kulturo.” Malfermis la aranĝon la ŝtata sekretario pri Kulturaj Aferoj, la prezidantino de Parana-Esperanto-Asocio E. Feitosa, kaj akademiano G. Mattos.

Pli ol 22 000 personoj vizitis la ekspozicion. La lokaj gazetoj kaj televid-stacioj vaste raportis pri ĝi.

ĈINIO. La Ŝjugo-a Normala Instituto (Ĝjangsu-provinco) akceptis Esperanton kiel duan fremdan lingvon en ekzameno por promocio. Ok geinstruistoj jam ricevis diplomon pasintjare pere de Esperanto: kelkaj el ili estas nomumitaj vic-profesoroj aŭ Esperanto-docentoj.

Krome, oni komencis instrui Esperanton en tri pliaj alternejoj de Anhuj-provinco. Pli ol 80 studentoj el ĉiu klaso lernas la lingvon. La Anhuj-Politekniko oka-

zigis Esperantan bild-ekspozicion speciale por konigi la Internacian Lingvon.

Post la fondiĝo de la Anhuj-a Esperanto-Kolegio en 1984 jam 1500 lernantoj finis dujaran korespondan Esperanto-kurson kaj 3000 finis unujaran kurson. La Eduka Eldonejo de la provinco eldonis Ĉinan-Esperantan Vortaron. La 30 000 ekzempleroj de la unua eldono estis tuj elĉerpitaj kaj la dua eldono aperos post nelonge.

* * *

La 7-an de julio j. k. en Moskvo la Prezidentaro de la Supera Soveto de Sovetunio honoris per ordeno por la amikeco inter diverslandaj popoloj Ge Bauĉ-juan, faman ĉinan tradukiston, por laŭdi lin pro lia kontribuo al la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Sovetunio. De la 30-aj jaroj s-ro Ge studas kaj tradukas rusajn kaj sovetiajn literaturajn verkojn. Liaj verkoj estas „Puŝkin kaj Ĉinio”, „Tolstoj kaj Ĉinio”, „Gorkij kaj Ĉinio” kaj liaj tradukoj „Elektitaj poemoj de Puŝkin”, „Fabeloj de Puŝkin” k. a. S-ro Ge estas membro de la societo „Amikoj de Esperanto” kaj prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio. Li multe zorgas ppi la amika kontakto inter esperantistoj de Ĉinio kaj Sovetunio kaj dediĉis sian artikolon memore al blinda rusa poeto Eroŝenko.

GDR. Por la unua fojo la renoma leĵpica hotelo „Merkur” uzis Esperanton: sur la higienaj saketoj, kiujn ĉiu gasto ricevas, estas kvarlingvaj klarigoj, interalie en Esperanto.

FRANCIO. La 5-an de junio j. k. en Eysines estis oficiale inaŭgurita „Strato Esperanto”.

IRANO. Baldaŭ estos preta por eldoniĝo la plej ampleksa Esperanto-persa vortaro, verkita de Aref Azari. La kunmetado de la vortaro, surbaze de PIV kaj plej fidele al ĝi, komenciĝis antaŭ ĉirkaŭ sep jaroj.

KUBO. La 7-an de aŭgusto j. k. komenciĝis la Esperanto-elsendoj de Radio Havano. Jen la horoj laŭ la universala tempo kaj la frekvencoj en kilohercoj: La elsendoj okazas ĉiudimanĉe je la 17a h per 11 760 (= 25 m), 15 340 (= 19 m) kaj je 22.00 h per 11 825, 11 725, 11 760, 11 930, 11 795 (= 25 m), 15 340 (= 19 m), 6 060 (= 49 m) kilohercoj. Pliajn detalojn petu ĉe **radio Havano, Esperanto-Sekcio, Havano, Kubo.**

POLLANDO. La prezidanto de la Pola Parlamento Roman Malinowski, la Honora Protektanto de la 72-a UK, dum sia ŝtata vizito al Aŭstrio, malgraŭ streĉita programo, rezervis tutan horon por vizito al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kies kulturalan laboron li alte taksas.

Supro de la bulgara sporto

La mondaĵ kaj eŭropaj ĉampionecoj, antaŭantaj „Olimpikojn'88“, igis nin optimisme atendi la sinprezenton de la bulgaraj konkurantoj dum la plej supera sportforumo. Sportistoj el rekorda landnombro — 160, venis al Seulo, unuigite de la olimpikaj idealoj, kaj eniris en pacan lukton por determini el inter si la plej fortajn. En tiu unika konkurado la bulgara sporto okupis indan lokon, firmigante sian aŭtoritaton. Bulgario estas sepa en la klasado laŭ medaloj (prioritaton en tiu lokigo havas la oraj distingoj) kaj kvina en la klasado laŭ poentoj.

Kion signifas tiuj ĉi 10 oraj, 12 arĝentaj kaj 13 bronza medaloj, gajnitaj de niaj sportistoj en la olimpikaj konkursoj? Sendube, bone planitan kaj alcelitan 4-jaran sinpreparon por plej sukcesa partopreno en la Olimpikoj. Apenaŭ troviĝus skeptikuloj, kiuj atribuas unu aŭ alian sukceson al bonŝanco, malgraŭ la plivastigita geografio de la sportpecoj, en kiuj ni gajnis distingojn. Ni faru komparon kun nia plej sukcesa ĝis nun olimpika sinprezentanto — „Moskvo'80“, konsiderante nur la ĉampiontitolojn. Antaŭ 8 jaroj ili estis 8 (lukto, halterlevo, bokso, sportgimnastiko kaj kanuokajako). Ankaŭ en Seulo la tradicio en tiuj sportpecoj estis konservita, sed jam pliriĉigita per oro en la malpezatletiko, naĝado kaj pafado.

Gradigi la ĉampionajn olimpikajn titolojn estas malfacile, sed decas komenci per la distingita per plena medalkolekto Vanja Geŝeva — ora medalo por remado en unuloka kajako, arĝenta — por la remado en duloka kajako, bronza — en kvarloka kajako. Bonega fono de ŝia 12-jara sportkariero en la bulgara nacia teamo! Ok jarojn Vanja atendis sian kulminan olimpikan tagon. Okupinte duan lokon en Moskvo, ŝi sopiris pri revenĝo kontraŭ la nevenkebla Birgit Fischer (GDR). Post ŝia brila venko en la rem-kanalo de Seulo iuj ĵurnalistoj ŝercis: „Kaj tamen Geŝeva ne sukcesis venki Fischer, kaj Cvetkova venkis Schmid“. Ja la du grandaj sportistinoj edziniĝis kaj ŝanĝis siajn familinomojn...




Saltas Hristo Markov.

Ĉu ni esperis iam, ke ni havos olimpikan ĉampionon pri naĝado? La ora medalo de Tanja Bogomilova estas eksterordinare altvalora pro kelkaj kaŭzoj. Unue, ĉiuj scias kia

estas la konkurenco en la naĝado ĝenerale. Due, temas pri brustnaĝado — la plej rapide progresanta naĝmaniero en la lastaj jaroj. Tria, Tanja revenis al la elito de tiu sportpeco post nasko. Kaj estiĝis la sola patrino — olimpika ĉampionino en naĝado! Tamen ankaŭ tiu atingi ne estis hazarda. Ĉe la konkurado de tiaj tradicie fortaj en la brustnaĝado landoj kiel GDR, Usono, USSR, Kanado, en du finaloj (100,200 m) nur Bulgario havis du reprezentantojn — kune kun Bogomilova naĝis ankaŭ Antoaneta Frenkeva. Tanja kaj Antoaneta — unua kaj dua en 100 m. Antoaneta kaj Tanja — respektive tria kaj kvara en 200 m! Kia pli konvinka pruvo pri mondoklaso!

En la „Reĝino de sportoj“ — la malpezatletiko, — nia ora distingo ĝis nun estis nur la monreala titolo de Ivanka Hristova. Kaj „Olimpikojn'88“ ni memoris dank'al nia unua olimpika venkinto ĉe la viroj. La monda kaj eŭropa ĉampiono en trisalto Hristo Markov atingis aknaŭ la olimpikan supron. Du bulgarinoj, du mondrekordulinoj, atakis la orajn medalojn. Sukcesis Jordanka Donkova, kiu kategorie superis siajn rivalinojn en obstaklokurado je 100 m. Apenaŭ estis specialisto aŭ sporta ĵurnalistoj, kiuj ne prognozis la olimpikan venkon al Stefka Kostadinova. Nia bonega saltistino ĉi-foje gajnis arĝentan medalon, sed tiel okazas en la sporto — ankaŭ la plej bonaj fojfoje malsukcesas. Sincere sonis la vortoj de la olimpika ĉampionino Ritter (Usono): „Mi estas feliĉa pro mia sukceso, sed kedu — Stefka Kostadinova restas la plej granda en la alta salto“. Restis 30 m ĝis la finalo en la plej mallonga sprinto (100 m) ĉe la virinoj, Anelija Nuneva kuris tuj post la bonega Grifitt Yoyner (Usono) kaj... absurda kontuzo senigis la bulgarinon je certa medalo en tiu tiel prestiĝa atletika speco.

La plej kategoria ĉampiono sur la boksringo estis la bulgaro Ivajlo Marinov (kategorio 48 kg). En tiu ĉi turniro ni vidis multajn erarojn de la matĉgvidistoj, multajn kompromisojn al reprezentantoj de la gasti-



Tanja Bogomilova kaj Antoaneta Frenkeva — tuj post la sukcesa finalo.

Foto: Emil MANĜAROV

ganta lando. Sola boksisto neatin-gebla por la matĉgvidistaj intrigoj estis Marinov — li gajnis ĉiujn due-lojn per 5:0 voĉoj. La granda majstro facile superis siajn rivalojn,

demonstrante la tutan belecon de la teknika amatora bokso.

Aliaj kvin bulgaroj suriris la plej altan ŝtupon de la venkopodio. La veterano de klasika lukto Atanas

Komšev donis lecionon pri vireco al siaj pli junaj samteamanoj. La programo de Ljubomir Geraskov sur ring-ĉevalo estis supro laŭ kompli-keco kaj originaleco je tiu gimnasti-kilo. Ni atendis oran medalon de la pafilo de Vesela Leĉeva, sed ni akiris ĝin per la pistolo de Tanju Kirjakov — dank'al grandioza finala par-serio. En la halterlevo Sevdalin Ma-rinov kaj Borislav Gidikov aldonis al siaj mondĉampionaj titoloj ankaŭ la oran olimpikan brilon.

Kaj ĉu malmultaj estis la ceteraj niaj bonegaj medaluloj? Oni diras, ke ĉiu arĝenta medalo estas duone ora kaj ni povas kredi tion, konside-rante kiom faris la luktistoj Rangel Gerovski, Jivko Vangelov, Stojan Balov kaj Ivan Conov, aŭ Adriana Dunavska en la artgimnastiko! Tre altvalora estas la bronza medalo de Manuela Maleeva — ja 64 jarojn la teniso forestis el la olimpika familio de sportspecoj kaj oni ĉiam memo-ros, ke ĉe ĝia reveno la bulgara teni-sistino estis inter la plej fortaj.

Pasis la plej sukcesaj por la bul-gara sporto olimpikoj. Iuj el la fame-konataj bulgaraj gekonkurantoj fi-nas sian sportkarieron. Sed por aliaj je la horizonto estas „Barcelo-no'92“.

Teodor ĈEREŠEV



Fine de julio j.k. la Asocio „Komunikado“ (Bulgario) emisiis SERION DE 4 POŝTMARKOJ kaj blokon, dediĉitan al la XXIV someraj olim-piaj ludoj, Seulo — 1988.

La projektojn de la kliŝoj ellaboris la pentristo Emilijan Stankov. Valoroj de la markoj: 5, 13, 32 kaj 42 stotiknoj kaj de la bloko — 1 levo. For-mato: 28,5 × mm (vertikale), bloko 111 × 77 mm (horizontale). Papero: blanka, gu-mita, 100% celulozo. Tekniko: multkolora ofse-to. Eldonkvanto: de la poŝtmarkoj — 250 000 kompletaj serioj, de la bloko — 210 000 dentu-mitaj kaj 12 500 nedentumitaj.

Draguŝko PETROV





Enlanda movado

Bona komenco

SOFIO. Belega mura bildtabulo kun surskribo „Per Esperanto por paco“ vidigis en la klasĉambro de 15-a mezlernejo de komunumo „Nadejda“ en Sofio. La gelnantoj jam scias, ke ĉi tie oni lernas Esperanton.

Solena malfermo de la nova lernejo okazis la 10-an de oktobro 1988. La kursgvidantino, la sperta instruistino Maria Slavĉeva parolis pri Esperanto, pri ties iniciatoro d-ro Zamenhof kaj pri ĝia rolo por defendo de la paco.

La prezidantino de E-societo „Espero“ en komunumo „Nadejda“ Jeĉka Pavlova bonvenigis la infanojn, priskribis koncize kiajn eblecojn malkovros Esperanto antaŭ ili, se ili sukcese ĝin eklernos. Ŝi montris albumon de Boris Pavlov, kiu apenaŭ 10-jaraĝa eklernis Esperanton kaj jam partoprenis kongresojn, korespondas kun multaj eksterlandaj amikoj. Por vekii intereson, ŝi montris ankaŭ aliajn objektojn — insignojn, bildkartojn, librojn, revuojn. Poste ŝi disdonis al la gekursanoj Esperanto-lernolibrojn, broŝuretojn kaj la bulgaringvan propagandan folion „Kio estas Esperanto?“.

La inaŭguron partoprenis la junulino Cvetelina Lallova, fininta 8-an gimnazion. (En ĝi kaj en 118 gimnazio — Sofio, oni lernas Esperanton kiel ordinaran lernejan objekton). Ĉeestis ankaŭ Libertaria Mladenova — metodikistino ĉe la Instrukomisiono de BEA. Ŝi bondeziris sukcesan laboron al la instruistino kaj al la gekursanoj.

La infanoj kantis „Alfabeto esperanta“.

La prezidantino de E-societo „Espero“ faris multajn klopodojn kaj devis venki diversajn malfacilaĵojn por organizi tiun kurson kaj du aliajn — en 101 mezlernejo kaj en la faklernejo „Nikola Korĉev“, kies malfermo estas antaŭstaranta.

Marija P. ANGELOVA

PERNIK. Jam ni estas sur la sojlo de la nova lernejo. La 4-an de oktobro j. k. la societestroj de E-societoj „Nova Vojo“ — Pernik kaj „Fajrero“ — Radomir, okazigis organizajn kunvenojn. Estis malfermita la nova lernejo kaj akceptitaj laborplanoj por la lasta trimonato.

Dum la pasinta lernejo, la fakultativaj studrondoj: en Pernik — 2 studrondoj lernejanaj, en Breznik — 1, kaj en u. Trăn — 1, atingis kontentigajn rezultojn.

La menciitaj societestroj jam anoncis publike siajn civitanajn kursojn por unua kaj dua grado. Denove eklaboros la infana studrondo ĉe la infanvartejo kaj la legejo en v. Izvor. Estas efektivigotaj ankaŭ fakultativaj studrondoj en la menciitaj lernejoj.

En aŭgusto finis sian laboron la UK en Nederlando. Neoficiala delegito (gasto) de E-societo „Nova Vojo“ — Pernik, estis nia ŝatata sekretariino Cvetana Popova. En unuhora prelego ŝi rakontis detale pri la kongresa laboro, pri la kongresdecidoj kaj la bela kongreslando.

Nikola MITEV

STARA ZAGORA. Laŭ la programo de la Esperanto-Domo de Kulturo la 5-an de oktobro j. k. — en la tago de urbo Stara Zagora ni, geesperantistoj solene malfermis la novan lernejon. Multaj veteranoj, aktivuloj kaj gelnantoj venis en la salondon de lernejo „Ivan Vazov“. La festan kunvenon malfermis Elena Zloĉevska — sekretariino de la urba societo „Verda Stelo“.

Post la interesa literatura-muzika programo la geesperantistoj interŝanĝis pensojn kaj opiniojn lige kun la novaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj dum tiu lernejo.

Stefka PETROVA,
instruistino

TRAFA E-PROPAGANDO

La ĉi-suba informo estis publikigita la 8-an de oktobro 1988 en gazeto „Samokovska Komunna“ — semajna gazeto, aperanta en urbo Samokov. Laŭ ni la aŭtoro trovis la ĝustan tonon por prezenti Esperanton al sia legantaro.

„BE“

Renkontiĝo de esperantistoj en Borovec

La 24-an de septembro j. k. 98 esperantistoj kaj amikoj de Esperanto kunvenis en hotelo „Rila“ por partopreni la tradician 13-an pacrenkontiĝon, dediĉitan al la 35-a datreveno de MEM. Tie ĉi estis reprezentantoj de 20 loĝlokoj el la tuta lando. Estis ankaŭ gasto el Francio — Michel Duc Goninaz, slavisto, universitata instruisto de rusa lingvo, direktoro de la Gramatika Sekcio ĉe la Akademio de Esperanto. Saluti la ĉeestantojn la prezidanto de la samokova E-societo Angel Manĉev. Pri la noblaj idealoj kaj la aktivado de MEM parolis la novelektita sekretariino de tiu internacia organizaĵo Fani Miĥajlova. La oficiala parto finiĝis per belarta programo.

Bedaŭrinde, multaj niaj samurbanoj scias preskaŭ nenion pri la eblecoj, kiujn proponas la kreita antaŭ pli ol unu jarcento internacia lingvo Esperanto. Ili ne scias ankaŭ ke dum la lastaj jaroj, dank'al Esperanto multaj samokovanoj veturis al Ĉeĥoslovakio, GDR, USSR, Pollando kaj konvinkiĝis pri ĝiaj avantaĝoj.

Nun la samokovaj esperantistoj havas komunan revon — ke ankaŭ ili siavice akceptu amikojn-esperantistojn el la tuta mondo en sia naskiĝurbo. Ili kredas, ke ne estas malproksima la tago, kiam la vintra sporta restadejo „Borovec“ transformiĝos en ŝatatan lokon por renkontiĝoj de amikoj de Esperanto el nia lando kaj el eksterlando, en internacian Esperanto-Centron.

Andrej ANGELOV,
sekretario de societo „Rila Esperantisto“



ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 11/1988)

REGIONO DE BURGAS

8000 Burgas
ul. „Lermontov“ 29 vh. I
Enjo Kostadinov Enev
E-societo „Nigra maro“

8500 Ajtos
ul. „Ivan Komitov“ 1
E-societo „Aglo“

8300 Grudovo
ul. „Jantra“ 13
Bojin G. Vučev
E-societo „Cv. Radojnov“

8400 Karnobat
wl. „Rusi Djankov“ 22
Vida Todorova Antonova
E-societo „Mondpaco“

8350 Malko Târnovo
wl. „22 oktombri“ 6
Andrej Drenčev
E-societo „Stranĝa“

8230 Nesebâr
ul. „Naroden jumruk“ 25, ap. 9
Manol Manolov
E-societo „Jana Lâskova“

8200 Pomorie
ul. „Vasil Kolarov“ 32
Tanja Tod. Gramatikova
E-societo „Mondpaco“

8533 Vinarsko
Maria Petrova Kostadinova
E-societo „Paco“

8600 Jambol
ul. „G. Georgiev“ 8, P. K. 25
Dimitâr Hristov
E-societo „Maksim Gorki“

8720 Boljarovo
Dimitâr Mihov Dragomanov
E-societo „Ambasadoro“

8680 Stralĝa
Tatjana Moneva
E-societo „Flamo“

8672 Tenevo
ul. „Tunĝa“ 1
Stojanka Petrova Levkova
E-societo „Progreso“

8700 Elhovo
Obŝtinski komitet na BKP
Hristo Georgiev Kostov
E-societo „Trakia lumo“

8690 Zimnica
Jordan Bančev Jankov
E-societo „Amikeco“

8800 Sliven
bul. „Tolbuhin“ 45
Venelin Vasilev
E-societo „Espero“

8970 Kotel
ul. „Tintjava“ 3
Božil Ivanov Dragangikov
E-societo „L. L. Zamenhof“

8900 Nova Zagora
P. K. 32 Nikola Nikolov
E-societo „Edmond Privat“

(daŭrigo en n-ro 1/1989)

NI KONDOLENCAS

La 25-an de septembro 1988 post longa malsanado forpasis la konata esperantisto Hristo Kanev, en aĝo de 73 jaroj.

Esperanton li lernis kiel gimnaziano. En 1930, kiam fondiĝis la Laborista Esperantista Asocio, li aliĝis al ĉi-proleta organizaĵo kaj disvastigis ĝiajn eldonaĵojn. En 1933 li partoprenis la nelegalan konferencon de

BuLEA en la regiono de Plovdiv. Samtempe li laboris en antifaŝistaj organizaĵoj.

En popoldemokratia Bulgario Hristo Kanev sukcese plenumis diversajn gravajn taskojn kaj estis dekorita per altaj ordenoj kaj medaloj.

La 38-a Kongreso de BEA elektis lin prezidanto de Centra Kontrola Komisiono. Ok jarojn

li laboris en tiu grava sektoro de la Asocio. La 40-a Kongreso elektis lin membro de CE de BEA. Samtempe li estis elektita prezidanto de la Sofia E-societo „Maksim Gorki“.

La sofiaj esperantistoj kliniĝas antaŭ la memoro de sia modesta kaj bonkora eksa prezidanto.

BEA



Deziras korespondi

BULGARIO

NOVAJ GEESPERANTISTOJ (16—35 jaraĵoj) el urbo Polski Trámbéš 5180, Loveŝka obl. — deziras korespondi kun ĉi pri ĉt: AKSENIJA ĤRISTOVA (oficistino) kaj PETĀR ĤRISTOV (konstruisto) — str. Georgi Petkov 38; ANETA DONČEVA (instruistino) kaj STOJAN DONČEV (urbestro) — str. Rakovska 25; VALENTINA KOROLJOVA (oficistino) — str. Rakovska 27 A; VIOLETA IVANOVA (oficistino) — kv. Klimentovo; GINGA DIMITROVA (laboristino) — kv. Klimentovo; DARINKA NAUMOVA (instruistino) — str. Javorova 21; DONKA NAČEVA (ovicistino) — str. Oborište 13/A; MARGARITA LICEVA (laboristino) kv. Klimentovo; NADKA GENOVA (instruistino) — str. Černo more 2; PENKO PETROV (oficisto) — str. Rila 14; PLAMEN KIRILOV (kino-teknikisto) — kv. Klimentovo; RADKA ĤRISTOVA (oficistino) — str. Slavejkov 18;

ĈEĤOSLOVAKIO

KAREL HÁJEK — 370 01 Ĉeske Budějovice, str. Kněžskodvorská 13 — kun ĉi. pri ĉt.

JANA NEMEČKOVA (16-jara) — 382 26 Horní Planá 299 — kun ĉi. pri muziko, literaturo kaj kino.

KATRIN MALICH (25-jara, oficistino) — 8251 Scharfenberg, OT Gruben 49 — kun ĉi. pri ĉt.

HUNGARIO

GÁBOR MEDVEČKI (23-jara, studento) — 4027 Debrecen, Ibolya u. 9, et. 1, ap. 4 — kun bulgaraj

gejunuloj pri lernado de fremdaj lingvoj, E-movado, turismo. Kolektas BK pri urboj kaj PM.

POLLANDO

LUCYNA LUKASIK (22-jara, laboristino) — 42-460 Międzyzice, woj. Katowice — kun ĉi. pri sporto, futbalo, kung-fu, karato. Kolektas sportajn fotograf-faĵojn.

EWA TROJANOWSKA (27-jara, kun du infanoj) — PL 87 600 Lipno, OS.M. Fornalskiego 9 m 5 — kun ĉi pri turismo kaj vojaĝoj.

JOHANO MACHATO (13-jara) — 67115 Bytom Odrzański, ul. Nowe Miasto 6-kun ĉi pri futbalo, ŝako kaj libroj. Kolektas PM.

GRZEGORZ WIENC (29-jara, laboristo) — 62 005 Owinska, str. Dworcowa 5/9 — kun ĉi pri muziko, fotografio, turismo kaj turismo.

PAWEŁ BROZEK (17-jara) 80 270 Gdansk, ul. Piłotów 10g/33 — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉt.

ADAM LIPINSKI (18-jara) — 08 300 Sokolow Podlaski, Kościuszki 14A — kun ĉi pri biologio, kemio, geografio kaj historio. Kolektas PM.

MARIA BALZYŃSKA (29-jara) — 89 600 Chojnice, ul. Konopnickiej 2/2 — kun ĉi pri naturscienoj, vojaĝoj, modo. Kolektas BK.

SOVETUNIO

JURIJ KORSUN (36-jara, maŝinisto-operatoro) — 245110 Ŝostka, Sumŝkaja obl., Ukrainio, p. k. 63 — kun ĉi pri pentroarto, faŭno kaj zepelinoj, sporto, muziko, kino. Kolektas BK kaj PM.

TATJANA KRILKOVA (23-jara, kuiristino) — 245110 Ŝostka, Sumŝkaja obl. Ukrainio, ul. Marata 25/173-kun bulgaraj esperantistoj pri turismo, literaturo, modo, Kolektas BK kaj PM.

ANDREJ SENIČEV (14-jara) — Riga 226065, ul. Lokomotivc, 82 58 — kun bulgaraj samaĝuloj pri ĉt.

RASA JUĐZAPAVIČIUTE (17-jara junulino) — 234520 Kapsukas, Uosupio 5—29, Litovia SSR — kun ĉi pri ĉt.

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

Jurnalo „Rabotničesko delo“ (22.IV.1988) aperigis trikolumnan artikolon de Nano Kjućukov pri la praktika peresperanta agado de bulgaraj, laboristaj esperantistoj en la pasinteco; la sama — jurnalo (2.V.1988) informas pri la ĝenerala konferenco de MEM en Budapeŝto kaj presis korespondanĵojn (10.VIII.1988) de sia propra korespondanto pri internacia junulara laborbrigado esperantista en u. Pleven; Ĵ „Otečestven front“ (13.IX.1988) aperigis kvinkolumnan raportojn de Ĥristo Čavdarov pri muzea esperanta kolekto de Dimo Martinov en v. Krán, departemento de Haskovo; la semajna gazeto „Transporten glas“ (27.IV.1988) donis lokon al artikolo de Rajna Váľkova pri bulgarlingva eldono de la esperanta prospekto pri Fervojista Muzeo en u. Hamar,

Norvegio.


EN LA LANDO:

Jurnalo „Borba“ — u. Veliko Tárnovo (12.V.1988) presis sur tri kolumnoj artikolon de Olga Cankova okaze de la Semajno de Esperanta Kulturo en la urbo; la sama jurnalo (3.VI.1988) publicis artikolon de Ĥristo Mednikarov pri komuna ekspozicio de esperantistoj kaj filatelistoj en u. V. Tárnovo kaj informas (28.VII.1988) pri plenumo fare de lernanta esperanta ensemblo de kanto, kantata de finlandaj soldatoj dum la Rusa-turka Liberiga Milito (1877—1878). La kanto estas sendita de finnlanda esperantisto; Ĵ „Šumenska Zarja“ — u. Šumen (30.VIII.1988) informas, ke la ŝtata librovendejo „Naĥodka“ en la urbo vendas kaj propagandas esperantajn librojn; sur la paĝoj de la sama jurnalo (1.IX.1988) Ĉvjatko Todorov raportas sur du kolumnoj pri la

73-a Universala Kongreso de Esperanto; Ĵ „Septemvri“ — u. Stara Zagora (15.VII.1988) informas pri inaŭguro de Esperanta Kultura Domo en la urbo; Ĵ „Botevgradski Plamák“ — u. Botevgrad (25.VI.1988) informas pri inaŭguro de Domo de la Libro „Trifon Ĥristovski“ kun noto pri la patrono — eminenta bulgara publicisto kaj esperantisto; Ĵ „Partizanski Zov“ — u. Pomorie (7.VI.1988) per la plumo de Váľčo Serbezov informas detale pri solena inaŭguro de strato „Esperanto“ en la urbo; Uzina gazeto „Duma na metalurga“ — aluminiaj uzinoj en u. Šumen (28.VII.1988) presas artikolon pri vendo de infanoj en sklaveco, tradukitan el Esperanto; la sama gazeto (26.VIII.1988) donas lokon al la informo de Ilia Andreev pri internacia esperanta ŝakturniro en u. Tárговиšte, kiun partoprenis ankaŭ membroj de E-klubo „Metalurgo“.

MIA PATROLANDO

Jen citaĵo el la samnoma poemo de Asen Grigorov (el la poemaro „Gardu la pacon!”): „En mia bela patrolando / kun klara penso, firma volo, / kun sia koro, sia sango / por paco luktas la popolo. / Pri vi, bulgara kara lando, / mi verkas versojn kun fervoro...” Daŭrigo: 2 (horizontale) kaj 12 (vertikale).



Horizontale: 10. Parazita fung'. 11. Kontraŭklerikala. 12. Duoble: rilata al la estro de la katolika eklezio. 13. Ne estis certa. 15. Partetoj de tasoj! 16. Reen: kvalito. 18. ... laboristoj (romano de H. Kirk, tradukita de L. Friis kaj W. Jensen) 19. Identita. (Radiko!) 20. Altvalora pro malofteco. 22. Tute ne laŭdinda ag'. 23. Granda ujo el metalo. 24. Posedata de la menciitaj

homoj. 26. Malnova kalkulil'. (Reen: hungarlanda vilaĝo.) 28. Alvoki dian favoron. (Radiko!) 29. Ne ekster. 31. Tempokalkul'. 32. Iu el la parencoj. (Radiko!) 33. Biblia persono. 35. La plej danĝera homo — malbona... en domo. 36. Greka lirika poet' el la VII-a jarcento antaŭ nia erao. 38. Paperfoliet', rajtiganta eniron.

Vertikale: 1. Dependiga konjunkcio. 2. Bulgara urbo kun arkeologia muzeo. 3. Sufikso de la vorto sub 6 (vertikale). 4. La plej grava punkto. 5. Kolor' en kartludoj. (Reen: estanta sen manko.) 6. Elĵet'. 7. Aersimila fluidaĵ'. 8. Persona pronomo. 9. Muzika ton'. 14. ... Konkordo (Esperanta gazeto, aperigita en 1931 en Bulgarujo) 17. Erbia oksido. 19. Kiel homo, admiranta kaj imitanta ĉion, kion li kredas laŭmoda. 21. Identaj literoj. 22. La kunulino de la persono sub 33 (horizontale). 25. An' de gento, dediĉinta sin servi la templon. 27. Malantaŭaĵ'. 29. Akvosvel'. 30. La pseŭdonimo de Emeriko Baranyai. 33. La miksitaj SAT! 34. Reen: demanda pronomo. 37. La duono de la vorto sub 20 (horizontale). 39. Duoble: herbaĉo. Helpo: 31. Era'.

Kompilis: Istvan TAKACS (Hungario)

NOTO DE LA RED.: Viajn leterojn kun solvoj ni atendas ĝis la 1-a de marto 1989. La solvon de la krucvortenigmo kaj la daŭrigo de la citaĵo el la poemo „Mia patrolando” de Asen Grigorov ni publikigos en n-ro 6/1989 de „BE”. Ni lotumos E-libron inter la solvintoj de la krucvortenigmo.



BE”



Distroj

MALKOVRU

LA DIFERENCOJN!



Inter la unua kaj dua bildoj estas
naŭ diferencoj. Kiuj estas ili?

AMUZA ZODIAKO



SAGITARIO

(22-a de novembro — 20-a de de-
cembro)

*Tutan vivon la Sagitarioj
celas al diversdangeraĵoj.
Parte estas ege laboremaj,
sed ekzistas pigraj, tro vagemaj.*

*Laŭnature ili estas tre obstinaj
kaj malbonaj en koler' senfina.
Ŝatas ege ili vojaĝadi,
kun la altranguloj kontaktadi.*

*Havas manierojn eĉ superajn,
la spiriton — poezi-liberan.
Viroj estas tre ĝentilaj, atentemaj,
la virinoj — ruzaj, konjektemaj.*

*Dommastrinoj estas kiel Hera —
art' kuira — de diino vera.
Lertaj kaj rapidaj, logikemaj,
kaj edzinoj taktaj, profitemaj.*

*Paŝas grave, peze al la celo
kun la naz' levita al ĉielo.
Ĉiuj kun spirit' aristokrata,
sed ne mankas eta ruzo kata.*

*Ligojn malstabilajn ne akceptas!
Se fidelas vi — li bone vin respektas.
He, Ĝemel' de ili ĉion prenas,
pro monero kaj cetero svenas...*

Esperantigis: Asen JOSIFOV

